

juna amiko

septembro 2017 • n-ro 3/2017 (152)



INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

jOmO kantas dum Woodstock
Konversaciaj Temoj: Budapeŝto
En Vroclavo oni kantis E-kantojn
Niaj du kongresoj en Suda Koreio

Jario

Aŭtoro: Roberto Alfonso Cruz
Tradukisto: José de Jesús Campos Pacheco



Adriano, vi estas tre dika, manĝi multe ne estas bone por via sano.

Mi ne estas dika, sed forta.



Vidu, kiel mi levas tiun ĉi kapridon.

Bee!



Bee!


Ĝi estas peza, sed rigardu kiel ĝi estas levita. Atentu!

?



Bee!

Ĉu vi rimarkas kiom forta estas mi?



A!



La kaprino montris, ke la plej forta estas ĝi.



Enhavo



Enkonduke: Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) 4



Konversaciaj temoj: Nokte en Budapeŝto (Judit Felszeghy, HU) 5



LUME: El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) 11



Nature: Kaeru! – Bone revenu hejmen! (Mireille Grosjean, CH) ... 12



LUDE, la unika dua etaĝo: Amiko de amiko estas ankaŭ amiko (Mónika Molnár, CH) 14



Rakonto pri la sano: Ĉu grandigi aŭ dikigi? (Renée Triolle, FR) 17



Legu kaj ĝuu: Konakrio – la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro 2017. (Małgosia Komarnicka, PL) 18



Rakonto: La plej grava libro (Luiza Carol, IL) 20



Poezio: Rajdi sur leono estas danĝere kaj traduki al Esperanto estas malfacile (Renato Corsetti, IT) 22



Kantu kun Juna Amiko: La sorĉa kanto-mondo (Małgosia Komarnicka, PL) 24

En Vroclavo oni kantis Esperantajn kantojn (Małgosia Komarnicka, PL) 25



Interkultura Mondo: Niaj du kongresoj en Suda Koreio (Elena Nadikova, RU) 26

Internacia simpozio en Vroclavo (Małgosia Komarnicka, PL) 31



Recenzo: Ĉu vi ŝatas bildseriojn? (Luiza Carol, IL) 32



Ekkonu mian landon pere de ĝiaj

legendoj: Bretonio (Małgosia Komarnicka, PL) 34



LASTE: Pri niaj someraj renkontiĝoj (Stefan MacGill, HU/NZ) 37

Landaj Perantoj 38

Rokmuzika festivalo: Esperanto en Woodstock (Halina Komar, PL) 39



Frontpaĝe: jOmO el Francio kantas dum la rokmuzika festivalo Woodstock.

Eldonanto de Juna amiko: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe ilei.mondo.info. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: <http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo>. Historio de la revuo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: <http://www.eventoj.hu/juna-amiko/>. Vidu ankaŭ lenu.net kaj edukado.net. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), stano.marcek@gmail.com aŭ redakcio@gmail.com. **Lingvaj revizantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ĉiuj el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprich, ILEI.Oficejo@gmail.com. **Landaj Perantoj** sur la p. 38. La sekva numero aperos en novembro 2017. **Limdatoj por sendi kontribuojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** €18 en tiel nomata A-landoj kaj €13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€15 kaj €12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

ISSN 0230 1318



Karaj amikoj!

En la norda hemisfero finiĝis somero, la ŝatata sezono de ferioj kaj libertempoj, sezono de la plej gravaj Esperantaj eventoj. Mia plej forta travivaĵo estas partopreno en Multkultura Vilaĝo Esperanto dum la grandega rokmuzika festivalo Woodstock en Pollando, pri kiu vi povos legi en tiu ĉi numero de *Juna Amiko*. Vi trovos en ĝi ankaŭ artikolojn pri multaj aliaj “someraj” travivaĵoj: nokta ekskurso en Budapeŝto, ferioj en la rubriko LUME, bona reveno hejmen post renkontiĝo kun ranoj, amikiĝo kun delfenoj en la rubriko LUDE, festivalo de Esperantaj kantoj kaj simpozio en Pollando, Universala Kongreso de



Esperanto kaj ILEI-kongreso en Suda Koreio... Nian promenon tra la someraj Esperantaj renkontiĝoj finos la tradicia krucenigmo en la rubriko LASTE.

En tiu ĉi numero vi trovos ankaŭ artikolojn pri nia sano, pri la ĉefurbo de Gvineo, vi povos konatiĝi kun bona libro el Bretonio kaj ABC-libro el Ĉinio, vi ekscios pri problemoj ĉe tradukado de poezio kaj kantos pri la mondo en la rubriko “Kantu kun *Juna Amiko*”.

Ĉu vi ŝatas bildstriojn aŭ bildseriojn? Krom la bildstrio el Kubo pri Jario nia recenzo prezentos al vi verajn trezorojn!

Krom la bona libro el Bretonio vi povos ekkoni ankaŭ tiun historian regionon de Francio mem.

– Agrablan legadon!

Via redaktoro **Stano Marček**

Karaj legantoj!

En viaj manoj vi tenas la revuon *Juna Amiko*, malgrandan ĵurnalon, eldonitan de ILEI. Vi estas leganta ĝin. Ĝi alvenas al vi kvarfoje jare, se vi abonas ĝin. Ion alian vi povas teni en viaj manoj kaj legi: librojn! En tiu ĉi numero de via revuo vi malkovros diversajn librojn, sed plie vi ekscios, ke ĉiun jaron iu urbo en la mondo estas la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro. En 2016 estis Vroclavo en Pollando. En 2017 estas Konakrio, la ĉefurbo de Gvineo, en okcidenta Afriko. Plie tiuj du urboj nun kunlaboras por provizi la afrikan landon per lernolibroj por infanoj; tiel ili povos lerni legi kaj povos ĝui



la enhavon de multaj libroj kaj de la Reto. *Juna Amiko* ankaŭ prezentas al vi kiel kutime bildstriojn en paĝo 2 kaj bildserion en paĝo 32. En paĝo 24 vi povas legi muziknotojn, se vi lernis fari tion. Ni pripensu, ke ĉiuj niaj abonantoj devas koni la latinan alfabeton por uzi Esperanton, eĉ se ili kutimas uzi alian alfabeton aŭ ideogramojn en sia denaska lingvo.

Ne maltrafu la belegan rakonton de Luiza Carol en paĝo 20 kaj 21 pri la plej valora libro de maljuna kuracisto. Mi

ne malkaŝos al vi, pri kiu libro temas en la rakonto. Vi malkovru mem! Mi deziras al vi ardan legadon! Sendube tiu arda legado plezurigos vin.

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI



Nokte en Budapeŝto

(Daŭrigo de la dialogo “Ŝipekskurso sur riverego Danubo”)

Help-materialo por ekzamenotoj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

I. Apud la riverego

Esperantistaj geamikoj el diversaj landoj babilas en Budapeŝto, la ĉefurbo de Hungario, apud la riverego Danubo, post alveno de ŝipekskurso: Andreo (A), Bianka (B), Davido (D), Kristina (K), Laslo (L), Marta (M), Nora (N) kaj Roberto (R). Vidalvide videblas la Reĝa Palaco de Buda (*Budai Vár*), iom pli fore monteto Gellért (*Gellért hegy*) kaj ponto Elizabeta (*Erzsébet híd*).

N – Jam preskaŭ malheliĝis intertempe!
Kion eblas vidi en mallumo?

M – Vi eĉ ne kredas, ke la nokta Budapeŝto estas eĉ pli interesa, pli alloga ol la urbo en taglumo!

N – Momente mi ne vidas multon...

L – Turnu vin nun, kaj rigardu la kontraŭan flankon de Danubo!

R – Ho...! Kiu konstruaĵo estas tiu, vidalvide?

L – Ĝi estas la Reĝa Palaco, nun unu post la alia heliĝas la reflektoroj kaj lampoj tie! Pli proksime al ni ankoraŭ videblas la rondeva bastiono, kun muregoj mezepokaj. Tiu parto post la bataloj kun turkoj de la 17a jarcento ĝis la postmilita rekonstruado en 1945 kuŝis subtere. Iom pli fore estis konstruitaj la renesancaj partoj kaj la baroka reĝa palaco, kiun nun vi vidas, super Danubo.

D – Ĉu bataloj kun turkoj?

L – Jes, en septembro de 1526, sekve de hungara malvenko, la turkoj okupis la palacon. Poste ĝi kelkfoje ŝanĝis posedantojn, aspekton kaj stilojn. Ĝi estis grave detruita kaj post la

militoj kontraŭ turkoj, kaj post la 2a Mondmilito, kaj kelkfoje rekonstruita.

K – Rigardu! Jam ĝi brilas en plena lumo!
Vere belega vidaĵo! Mi tuj fotas ĝin!

B – Kiel impona, neforgesebla vidaĵo!

K – Tre plaĉas al mi la diverseco de la tuta konstruaĵo!

L – Nun en ĝi troveblas partoj en stiloj gotika, renesanca, baroka kaj neobaroka. En la postmilita rekonstruado la Reĝa Palaco ricevis plisimpligitajn, modernajn partojn kaj aspekton.

R – Kiu loĝas nun tie, anstataŭ reĝoj?

L – En ĝi troveblas nun la plej granda biblioteko de nia lando kaj diversaj muzeoj, galerioj. Ĉi tie ni supreniru, al la Duna-promenejo!

B – Kiel ĉarma skulptaĵo! La figuro, kiel vera knabineto sidas sur la fera barilo!
Kio estas sur ŝia kapo?

M – Ĝi estas grandega reĝa krono, kiun oni eltondas el papero por infanoj! “Ŝi” estas la “Eta Reĝinido”, tre populara vidaĵo de la urbo.

L – Maldekstre estas belforma monteto kun virina figuro sur la pinto, antaŭ ĝi, la svelta ponto Elizabet heliĝas super la Danubo.

B – Ĉu ni promenu tien?





L – Ne, mi proponas marŝi al la kontraŭa direkto, laŭ la bordo de Danubo. Ĝi estas belega promenejo “Duna-krozo”.


II. Urbotrarigardo

La diverslandanaj geamikoj **Andreo (A)**, **Bianka (B)**, **Davido (D)**, **Kristina (K)**, **Laslo (L)**, **Marta (M)**, **Nora (N)** kaj **Roberto (R)** daŭrigas sian urborigardadon sur la Peŝta flanko de Budapeŝto, de la apudborda haveno, promenante norden, preter “Vigadó”, proksimiĝante al “Lánchíd”, poste reen al placo “Vörösmarty”, por tie entramiĝi en la metrolinion n-ro 1.

N – Vere mirinda promenejo! Ni samtempe povas plezuriĝi per la vidaĵoj de la Palaco transe, dekstraflanke per la belaj konstruaĵoj, kaj ĉion ĉi respegulas la riverego!

A – Rigardu tiun palacon ĉi-flanke! Kiel bele kaj riĉe ornamita ĝi estas!

L – La origina konstruaĵo “Vigadó” (vigado), “Amuzejo”, estis starigita samloke en la komenco de la 19a jarcento, de fama hungara arkitekto por grandaj festenoj, baloj, koncertoj. Ĝi estis elegante bela kaj ekstere kaj interne, kun freskoj, skulptaĵoj kaj ĉizitaj lignaj detaloj. Sed dum la liberecbatalo de hungaroj kontraŭ la Habsburgoj en majo 1849 la venĝemo detruis ĝin, kune kun aliaj palacoj,



hoteloj, teatroj en la Peŝta bordo de Danubo. Tiu ĉi estas en romantika stilo, “ĉardaŝo ĉizita en ŝtono”, tiel opiniis pri ĝi iu vizitanto. Tamen post la dua mondmilito ĝia interno estis plisimpligita, kaj ĝi donas hejmon krom koncertoj ankaŭ al ekspozicioj.

R – Mi volonte partoprenus belan koncerton ĉi tie!

N – Mi preferus elegantan balon, en longaj belaj roboj!

L – Baloj kutime jam ne okazas ĉi tie! Sed ni iru plu, kaj rigardu maldekstren, al la direkto de Danubo!

A – Kiel impona ponto, kun la grandegaj arkoj kiel pordegoj, kaj leonoj ĉe la pontokapo!

D – Ĝi aspektas ne nova ponto! Kiam ĝi estis konstruita?

L – Ĝi estas ĉenponto, nia unua konstanta ponto, kaj ĝi nomiĝas Széchenyi Lánchíd (seĉenji lanchid). Grafo Széchenyi estis politikisto, kiu iniciatis ties konstruon. La kostoj estis ege altaj; oni devis atenti pri la piedoj, pri la surpendigo de la ponto, antaŭ ol decidi. Angla arkitekto William. T. Clark preparis la planojn.

D – Ĉu ne estis tiu sama, kiu planis la unuan pendoponton, Ponton Hammersmith en Londono?

L – Ĝuste tiel, Davido! Kaj la skoto William Clark direktis la konstruadon. Li mem helpis defendi la ponton kontraŭ eksplodigo dum la liberecbatalo, kaj mem laboris poste en Hungario, edzinigis al si hungaran knabinon, kaj vivis en la hungara ĉefurbo.

A – Ĉu tiu ponto ne detruigis dum la mondmilito?

L – Bedaŭrinde jes, eĉ grave, kiel ĉiuj niaj pontoj. Dum la rekonstruado la ponto ricevis pli vastan plankon.

B – Rigardu, kiel interese, ke sur la kontraŭa bordo, kvazaŭ daŭrigo de la ponto, staras tunelo!



III. Alveno al metrostacio

La diverslandanaj geamikoj **Andreo (A)**, **Bianka (B)**, **Davido (D)**, **Kristina (K)**, **Laslo (L)**, **Marta (M)**, **Nora (N)** kaj **Roberto (R)** alvenas al la metrostacio “**Hősök tere**”, kaj tie ili adiaŭas la noktan Budapeŝton.

L – Jes, budapeŝtanoj eĉ ŝercas, ke la tunelo en la Fortikaĵa Monto estis konstruita tiucele, ke dum pluvego oni povu entiri la ponton en la tunelon.

K – Ĉio ĉi estas tre bela kaj interesa, sed mi estas jam laca!

N – Kaj mi sentas ankaŭ nevenkeblan dormemon!

L – Ni tuj ekveturos iom per subtera tramo, kaj tie vi povas iom sidadi. Dumvoje al la haltejo rigardu flanken, tie, sur la bordo de Danubo, videblas la konstruaĵo de nia Parlamento!

A – Kiel bele respuguliĝas la prilumigita konstruaĵo sur la nigra surfaco de Danubo!

L – Kvankam la ideo ege altigis la kostojn starigi la Hungaran Parlemejton – hungare “*Országház*” (*orsag haz*) – sur la bordo de la riverego, sed tio estas tre impona vidaĵo. Ĝi estas grandega, 268 metrojn longa, 118 metrojn larĝa, 96 metrojn alta kun la meza kupolo, 27 pordegoj kaj 29 ŝtuparoj, kaj tamen ĝi videblas malpeza, kvazaŭ ŝvebanta super la akvo. Tiun efikon atingas la sveltaj turoj, ornamaĵoj, skulptaĵoj eksteraj. Ankaŭ interne ĝi estas tre impona; tie troveblas reliefoj, bildoj, skulptaĵoj; por la ornamado oni uzis 40 kilogramojn da oro. La Hungara Parlemejo fariĝis ankaŭ simbolo de nia lando.

L – Ni intertempe alvenis al la fina haltejo de la subtera tramo; ni subeniru; venu!

L – Dum ni veturas al la direkto de la plej bela placo de nia ĉefurbo, mi rakontas al vi, ke tiu ĉi subtera fervojo estis konstruita en la 19a jarcento ne subtere, sed surtere. La necesa tunelo por la fervojo estis ne borita, sed fosita, kaj ĝi estis la dua en Eŭropo, post la Londona.

M – Tre simpatiaj estas la haltejoj kun la blankaj kaheloj kaj la ornamaĵoj sur la feraj kolonoj; ili aspektas kiel la originalaj, ĉu ne?

L – Leviĝu; ni alvenis! Kaj jen, rigardu la tre imponan placon!

Ĉiuj – Ho, mirinde! Ege bela ĝi estas! Kia vidaĵo!

L – Ne hazarde, la skulptisto de la meza komponaĵo – 36 metrojn alta kolono, kun Ĉefanĝelo Gabrielo sur la pinto – ricevis la oran medalon en la Pariza Mondekspozicio en 1900. Ĉirkaŭ la kolono videblas princo Arpad kaj la aliaj ses tribestroj surĉevale, kiuj





gvidis la hungarojn al la Karpata baseno. Niaj unuaj reĝoj estis el la dinastio de Arpad. La palaco ricevis sian nomon pro la memorŝtonego antaŭ ĝi – origine honore al la herooj de la 1a Mondmilito, sed ĝi estas destinita al herooj de Hungario, elstaraj reĝoj, generaloj, politikistoj; ĉirkaŭirante la du duonrondaj starigitajn kolonarojn, vi povas ekkoni la tutan historion de nia lando, tra la 15 skulptaĵoj inter la kolonoj, kaj la subaj reliefaĵoj fragmentoj. Sur la kolonaroj, supre, troviĝas la alegoriaj skulptaĵoj: vidalvide sur ĉaroj, Milito kaj Paco, kaj sur la eksteraj flankoj Laboro kun Riĉeco kaj Scio kun Gloro.

D – Ambaŭflanke de la placo staras du dignoplenaj konstruaĵoj, vidalvide. Kio ili estas?

L – Ili ambaŭ estas muzeoj, kaj intence ili similas al la antikvaj grekaj konstruaĵoj kun la kolonaroj. La dekstra, Arthalo, hungare Múcsarnok (*muĉarnok*) ne havas propran muzean kolektaĵon; ĝi servas kiel ekspoziciejo, dum la alia estas nia Belarta Muzeo kun riĉa kolekto de eksterlandaj eksponitaj objektoj, pentraĵoj kaj skulptaĵoj.

B – Iomete pli fore mi vidas ponteton. Kien ĝi gvidas?

L – Tie troveblas la plej granda parko de nia urbo, Városliget (*varoŝliget*) – Urba Bosko – en distanco kelkajn paŝojn de ĉi tie. Tuj post

la lageto troveblas impona kaj populara kastelo “Vajdahunyadvár” (*vajdahunjadvar*), kiu en si mem kunigas la arkitektajn stilojn per iom malgrandigitaj kopioj de kelkaj famaj konstruaĵoj. Ĉi tie troveblas la Hungara Agrikultura Muzeo, kaj en la gotika kapeleto la geedziĝontoj tre ŝatas eldiri la feliĉigan “jes”. En la 1-kvadratkilometra parko troveblas proksimume 6500 arboj, inter tiuj multaj pli ol centjaraj. Krome skulptaĵoj, sportejoj, amuzejoj...

R – Mi tre volonte promenus en tiu romantika loko!

B – Mi kredas tion, Roberto, sed prefere ne nun, ĉar mi jam eĉ stari ne povas!

N – Kion kaŝas tiu ĉi metala plato surtere, antaŭ la kolono?

L – Sub ĝi troveblas la puto borita en la 19a jarcento, kaj ĝi donas bonkvalitan varman kuracakvon.

A – Mi aŭdis, ke Budapeŝto estas fama ankaŭ pro ĝiaj kuracakvo kaj banejoj.

L – Ĝuste! En Városliget (*varoŝliget*) troveblas la belaspekta banejo, kiu estas la plej granda banejkomplekso en Eŭropo, kun varma kuracakvo.

A – Geknaboj, hodiaŭ estas ankoraŭ sabato!...

D – Jam dimanĉo, Andreo, pasis jam noktomezo!

A – Tiel hodiaŭ ni povos viziti unu el la mirindaj banejoj de la urbo! Kiel mojosa amuziĝo tio estos!

L – Ĝis tiam vi estos miaj gastoj por duonnokto, iom dense sed bonhumore en mia loĝejo! Ni iru!



Taskoj

I.

Legu atente la dialogon, ne la tuton, nur laŭ la ĉapitroj. Dume kontrolu, ĉu vi komprenas ĉion, ĉu ne restis nekonata vorto aŭ esprimo! La nuna teksto estas iom pli malfacila ol la aliaj.



- Disdonu la rolojn kaj legu tiel la dialogon, laŭ la ĉapitroj (almenaŭ) dufoje!
- Klopodu respondi, ne rigardante la tekston: Vicigu, kion oni povas vidi en la flanko Buda, de la bordo de Danubo!
- De kiu tempo estas la plej malnovaj partoj de la Reĝa Palaco? Kiuj instancoj troveblas nuntempe en la Reĝa Palaco?
- Kiu konstruaĵo memorigas nin pri hungara danco?
- Kiel oni povas nuntempe amuziĝi en amuzejo “Vigado”?
- Imagu, ke vi estas nun en Budapeŝto, –kiel vi povas rekonii la ponton “Lanchíd”?
- Kiu konstruaĵo fariĝis simbolo de Hungario?
- Pro kio famiĝas la Budapeŝta metroo?
- Kio estas laŭ vi, la plej interesa konstruaĵo aŭ skulptaĵo en la placo Hősök tere?




II.

- Imagu, ke vi volas prezenti vian loĝlokon al via esperantista amiko. Vicigu, kion indas viziti! (vi povas mencii lernejojn, sportajn kaj kulturajn instancojn, fabrikon kaj uzinon, malnovajn konstruaĵojn, preĝejojn, parkojn ktp)!
- Solvu la supran taskon kiel rolludon! La alia(j) kunludanto(j) starigu demandojn (kiam oni konstruis ĝin; kiu loĝas tie; kiom granda ĝi estas), faru rimarkojn (kiel bela vidaĵo, kiel interese) ktp!



III.

- Kiu estas via preferata urbo kaj kial?
- Prezentu ĝin (kiel rakonton dum 3 minutoj, aŭ skribe, letere, en 15 – 20 linioj), kaj emfazu, kial vi ŝatas ĝin!
- Prezentu al via(j) amiko(j) vian ŝatatan konstruaĵon aŭ skulptaĵon (kie ĝi troviĝas, kiam, de kiu ĝi estis farita, kiel ĝi aspektas, kial vi ŝatas ĝin)!
- Faru planon pri urborigardado kaj prilaboru tekston (ĉirkaŭ 1 – 3 paĝan) pri via ŝatata/proksima/ imagita urbo. Laŭ la planita vojo prezentu la vidindaĵojn, rakontu pri ili, kion indas mencii!





Vortklarigoj

Vidalvide: en la kontraŭa pozicio.

Bastiono: plifortigita elstarajo, turo – el ŝtono, aŭ alia konstrumaterialo – el la muro, ofte kun malvastaj fenestroj por ebligi pafadon de interne al la atakantoj.

Gotiko, renesanco, baroko: diversaj artaj stiloj, ĉefe en arkitekturo, en diversaj epokoj.

Neobaroko: ĉefe arkitektura stilo en la 19a jarcento, uzanta la elementojn de la stilo baroka.

Ĉardaŝo: tre populara hungara popoldanco, el partoj malrapidaj kaj rapidaj.

Ĉenponto: la vojstrukturo de la ponto estas alligita al kunligitaj, pendigitaj, ankritaj ĉenoj.

Pontokapo: ofte ornamita elstarajo ambaŭflanke de la pontoj, kiu origine havis la rolon ebligi protekti kaj kontroli la ponton.

Medalo: metala disketo surhavanta ambaŭflanke bildon, signojn aŭ surskribojn, stampita kiel memoraĵo pri grava okazintaĵo aŭ kiel honoraĵo al merita homo.

Reliefo: elstarajo de io sur ebena surfaco digno-plena: Aspekto, vidaĵo, kiu meritas respekton.

Timpano: (ĉi tie) enkadrigita triangulo sur la antaŭa, supra muro de konstruaĵo, ofte kun internaj reliefoj aŭ pentraĵoj

Epoko: jararo prezentanta apartan propran karakteron.

Eksponi: prezenti publike objektojn.

Bori: fari cilindroforman truon per pinta ilo.

Kuracakvo: minerala akvo, ofte varma, kun pruvita kuraciga efiko.

Densa: Tia, ke ĝiaj eroj tre proksimas unu al la alia, multnombraj en malgranda volumeno.

Mojosa: Akronimo de modernjunstila, t.e. “mjs-a”; impresanta aŭ plaĉanta al junuloj.

Klarigo pri nomoj en la dialogo

Budapeŝto – hungare: Budapest (*elparolo: budapeŝt*), la ĉefurbo de Hungario, kiun la riverego Danubo dividas je du partoj, Peŝt kaj Buda.

Danubo – hungare kaj sur mapoj: Duna (*elp.: duna*), la 2a plej granda rivero en Eŭropo, origininte en la germana Nigra Arbaro kaj post 2850 kilometroj, enfluanta en la Nigran Maron. Ĝi estas la ĉefa akvokolektaĵo en Hungario kun la direktoj unue orienta, poste suda, longeco 417 km.

Budai Vár – hungara nomo de la Fortikaĵo de Buda, tio signifas ne nur la fortikaĵon mem, sed la tutan mezepokan komplekson, siatempe ĉirkaŭitan de muro.

Gellért hegy – hungara nomo de Monteto Gellert, fakte nur 100 metrojn alta super la nivelo de Danubo, sed relative kruta kun rokoj. La nomon ĝi ricevis pro la episkopo, kiu estis mortigita ĉi tie.

Erzsébet híd – ponto Elizabeta, ĝi troviĝas super Danubo, en Budapeŝto.

Duna-krozo – hungara nomo de Promenejo Danubo.

Vigadó – (*elp.: vigado*) signifas amuzejon.

Lánchíd, ĝia plena nomo estas *Széchenyi*.

Lánchíd (seĉenji lanchid) – ĉenponto.

Országház – (*elp.: orsaghaz*), laŭvorte: lando-domo (kiel urbodomo), ĝi estas parlamentejo.

Hősök tere – (*elp. hoŝok tere*) – Placo de herooj.

Arpad aŭ **Árpád vezér** (*elp.: arpad vezér*) – elektita estro de veziroj, aŭ tribestroj, kiuj alkondukis la hungarojn en la 10a jarcento al la Karpata baseno, estis la praulo de la hungaraj reĝoj ĝis la morto de la lasta el la dinastio, komence de la 14a jarcento.

Karpatoj – centra montaro en Eŭropo, kun longeco en okcidenta-orienta direkto 1500 km, vasteco inter 12 kaj 500 km, okupas 190 mil kvadratkilometrojn. Ĝi, kun Dinara-montaro kaj Alpoj, ĉirkaŭas la Karpatan basenon.

El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak



Kolorigu la suban bildon laŭ la supran! Nomu la objektojn, bestojn kaj homojn! Kion ili faras? Kiajn vestojn portas la homoj? Kiajn kolorojn havas la objektoj, bestoj kaj vestoj? Kio okazas sur la bildoj? Ĉu ili estas egalaj?



Kolorigu! Trovu la 16 diferencojn!



Mireille Grosjean

Kaeru! – Bone revenu hejmen!

Kaeru estas japana vorto kun du signifoj: ĝi signifas *rano* 蛙 kaj *bone revenu hejmen!* 帰る

Rano estas amfibio, kiu bezonas akvon. Tamen ĝi spiras aeron, do kutimas sidi sur ŝtono, tereno aŭ folio, ne for de akvo. Marĉo bone konvenas al ĝi: humida, eĉ malseka tereno. Ĝi bone naĝas kaj alte saltas. Ĝi manĝas insektojn, lumbrikojn kaj foje fiŝetojn. Ĝi estas tre utila en la naturo, sed multaj aferoj endanĝerigas ĝin: diversaj malsanoj, sekigado de terenoj kaj marĉoj, uzo de venenaj sterkaĵoj en agrikulturo kaj ĉefe aŭtotrafiko. Estas plej diversaj specioj tra la mondo. Ĝi ne estas mamulo; inaj ranoj demetas ovojn en akvon. Precize: ĝi apartenas al regno de bestoj, al filumo de ĥorduloj, al subfilumo de vertebruloj, al superklaso de kvarpieduloj, al klaso de amfibioj. La plej malgranda konata vertebrulo en la mondo estas rano, tre malgranda rano, proksimume unu centrimetron granda. La ordo *Anura* (el la antikv-greka *a* aŭ *an* signifas “sen”



Rano sur branĉo.

Bluhaŭta rano “*Dendrobates azureus*”.

kaj *ura* signifas “vosto”) enhavas la ranojn kaj bufojn; do temas pri senvostaj bestoj. Juna ranido havas voston, sed ne krurojn, tamen kiam plenkreska, ĝi estas kvarkrura kaj senvosta. La blekado de rano nomiĝas kvakado: rano kvakas. Ne miksu bufojn kun ranoj!

Kiam mi instruis Esperanton en Burundo, mi vidis ranojn en la koridoro, irante al mia ĉambro. Ĉar mi scias, ke ekzistas ranoj kun venena likvaĵo sur sia korpo, mi demandis al miaj studentoj. Ili respondis: *Estas multaj ranoj ĉi tie, ili ne estas danĝeraj*. La venontan tagon dum duŝado mi vidis ranon apud miaj piedoj. Ĉar en Afriko ĉiam estas granda sitelo plena je akvo kaj poto por ĉerpi akvon el ĝi, por finduŝi sin kaze de akvopaneo, mi prenis la poton kaj facile kaptis la ranon per ĝi. Mi metis 1-2 cm da akvo en la poton, tiel la besteto povis resti humida kaj havi sian kapon ekster la akvo. Post mia duŝado mi iris kun la poto al la ĝardeno: mi liberigis la ranon.

Kiam mi restadis en Japanio, mi ricevis donace ranetojn el plasto aŭ simila materialo. La signifo estis: *bone revenu hejmen!* Kial mi ne komencis kolekti tiujn beletajn objektojn...

*“Kie ajn rano iras,
ĝi ĉiam marĉon sopiras.”*

“Rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo.”
El Esperanta Proverbaro de Zamenhof



Eŭropa fajrzonu bufo.



Panama ora rano.



Venena grajnorano.



Itala arborano kun pufigita voĉosako.



Ora bufo, formortinta.



Tilera arborano kun fingrokusenetoj.




Itala arborano.



Eŭropa arborano.



Amiko de amiko estas ankaŭ amiko



La rubrikon prizorgas Mónica Molnár

**Kiel promesite,
Ĝojulido multe ludis
kun Ulideto tiun
posttagmezon post
la faritaj hejmtaskoj.**

La infaneto estis
nekredeble
feliĉa, iom eĉ tro

ekscitita, sed ne gravis. Almenaŭ tiam ankoraŭ ne. Okazis, ke tiun vesperon ĉiuj estis for de la domo kaj nur ili du devintus vespermanĝi hejme. Jes ja, sed kion manĝi? Avinjo devis urĝe ekveturi al sia fratino kaj ne havis tempon por prepari ion ajn al ili. Ŝi multe zorgemis pro tio, sed Ĝojulido trankviligis ŝin:

Ne timu, Avinjo, mi zorgos pri Ulideto. Ni certe ne malsatmortos, iru trankvila.
– ridetis li svingante la manon al la avino.

Tiam li ridetis, sed nun? Nun li komencas zorgemi, ĉar en la granda ludado kun la etulo li tute forgesis pri la horo. Pluse Ulideto estis ekscitita kaj komencis tre malsati. Ho, tiuj du aferoj kune promesas nenion bonan ĉe infanoj. Efektive, Ulideto ne plu trovis sian lokon, kuris de unu ĉambro al la alia kaj kriadis senĉese. Ĝojulido komencis senesperigi, ja en tiuj kondiĉoj li ne plu sentis sin kapabla konvene okupiĝi pri Ulideto kaj pri la manĝaĵo samtempe. Sincere dirite, la kuirado ĉiuokaze ne estis lia forteco...

Subite li ekhavis genian ideon. Eble li povas inviti sian amikon, Kuiremulidon por helpi en la kuirejo, poste manĝi kune kaj fine por rigardi



filmon kune atendante la rehejmiĝon de la gepatroj. Kompreneble la etulo tiam devos jam dormi, do la fino de la tago estos trankvila kaj ripoziga, pensis Ĝojulido. Bedaŭrinde li tuj rakontis la tutan ideon al Ulideto...

Ĉu vi komprenas la katastrofon? Li rakontis ĈION! Malbonŝance ankaŭ tiun parton, kiam la du pli grandaj rigardus filmon dum la infano devus jam dormi. Katastrofo! Kompreneble Ulideto tute ne konsentis pri tio.

– Vi estas maljusta! Vi pensas ĉiam nur al vi mem! Ankaŭ mi volas rigardi filmon kun vi! Ankaŭ mi estas granda!

– Ulideto, trankviliĝu! Se vi tiom kriis, Kuiremulido eĉ ne metos siajn piedojn en nian domon kaj tiam ne nur la filmo estos for, sed ankaŭ nia vespermanĝo. Vi ne volas tion, ĉu ne?

– Ne, certe ne, sed ankaŭ mi volas vidi filmon! Ankaŭ mi estas granda!

– Jes, jes, certe, ankaŭ vi estas granda. Tamen, permesu al mi unu rimarketon. Profitu tamen el la avantaĝoj de via aĝo kaj grandeco antaŭ esti tute-tute granda. Tio povas esti utila foje.

– Tute ne! La etuloj havas neniun avantaĝon. Ĉiam ĉio estas permesita nur al la granduloj!

– Ho, mi devas kontraŭdiri vin! Mi certegas, ke vi ne konas la rakonton pri la sagaca delfeno! Ĉu mi pravas?

– Jes, vi pravas. Pri kio temas?

– Se vi promesas ne plu krii, mi



rakontos al vi la historieton de Iseo Mormile pri la sagaca delfeno, dum ni atendas Kuiremulidon, kiu estas jam survoje al ni. Do, aŭskultu bone!


- Do, ĉu vi komprenas, kial ne tiom malbonas esti foje malgranda?

- Jes, mi komprenis, sed... la filmo...
- rekomencis Ulideto.
- Ne maltrankviliĝu! Se vi estos simpatia al Kuiremulido kaj manĝos vian vespermanĝon, mi promesas al vi interesan kaj longan rakonton antaŭ ol



**Iseo Mormile:
La sagaca delfeno**


Estis foje delfeno. Li ŝatis naĝi kun sia familio kaj siaj amikoj. Ili saltis, naĝis rapide aŭ foje naĝis profunde por admiri la konkojn kaj aliajn bestojn.



Unu tagon tri ŝarkoj naĝis al ili. La delfenoj ne vidis la ŝarkojn. Lastmomente ili tamen ekvidis la danĝerajn bestojn. La delfenoj fornaĝis en ĉiujn direktojn.

La tri ŝarkoj elektis unu delfenon kaj komencis sekvi lin. La delfeno naĝis rapide, li estis tre sagaca. Ankaŭ la ŝarkoj naĝis rapide, kaj ili estis tri, sed tute ne sagacaj.







La delfeno eniris truon kaj la tri ŝarkoj volis sekvi lin. Ili ne sukcesis, ĉar ili estis tro dikaj, do nur la delfeno povis eniri. La tri ŝarkoj trafis nur la muron.



En la truon estis multaj strangaj bestoj. La delfeno ektimis, sed li ne povis eliri la truon, ĉar estis ŝarkoj je la alia flanko. Li serĉis alian elirejon.



La delfeno eĉ trovis alian truon por eliri, sed unu ŝarko atendis lin je la alia flanko. Estis malhele kaj la delfeno ne vidis la ŝarkon, sed la ŝarko vidis la delfenon!



Intertempe la aliaj delfenoj venis kun granda, dika baleno, por helpi sian amikon. La ŝarkoj fornaĝis rapide. La delfeno estis feliĉa kun siaj grandaj kaj malgrandaj amikoj.

iri en la liton. Ĉu bone tiel? – demandis Ĝojulido.

– Jes, tre bone! Kaj ne timu, certe mi estos simpatia al Kuiremulido! Mi havas eĉ du kialojn por tio: unue, ĉar estos li, kiu faros por ni bonan vespermanĝon, kaj due, li estas via amiko, kaj vi estas mia amiko, do la amiko de amiko estas ankaŭ amiko! Ĉu ne?

En tiu momento la pordo malfermiĝis kaj aŭdiĝis la voĉo de Kuiremulido:
– Altabliĝu!
La vespermanĝo alvenis!





Renée Triolle

Ĉu grandiĝi aŭ dikiĝi?

Granda parto de la monda loĝantaro suferas pro malsato, dum alia granda parto dikiĝas.



Laŭ sciencistoj via alteco dependas je 60% de genetiko ⁽¹⁾ kaj 40% de via nutrado kaj medio. Se viaj gepatroj aŭ avoj estas altaj, verŝajne ankaŭ vi estos alta.

Interese estas konstati, ke ĉie en la mondo la nunaj infanoj estas pli altaj ol la geavoj : +11 cm en Britio, +6 cm en Usono, +11 cm en Ĉinio! Tiu kresko ĉefe dependas de pli bona kaj varia nutrado. Plej altaj estas nederlandanoj (averaĝe viro altas 1,83 m, t. e. + 15 cm dum la lastaj 30 jaroj), plej malaltaj indonezianoj (1,58 cm).

Tiu kresko devigas la inĝenierojn plani pli da spaco en la transportiloj (trajno, aŭtobuso), ĉar la gamboj de la vojaĝantoj estas pli longaj, kaj la moddesegnistojn proponi pli grandajn vestaĵojn. Sed sciencistoj opinias, ke tiu kresko finiĝis en 2016! Bedaŭrinde, en regiono, kie homoj suferas pro malsato, en sudsahara Afriko, la alteco malkreskis dum la lastaj 40 jaroj.

Apartaj estas la pigmeoj, kiuj mezuras 1,50 m. Tiu popolo ĉiam estis malalta (la nomo venas el la greka lingvo kaj signifas alta kiel ulno⁽²⁾). Kial? Iuj argumentas, ke ju malpli da surfaco, des malpli da varmigo; aliaj, ke necesas granda energio por paŝi tra densa arbaro, do la homo adaptiĝis al la medio, kaj la du pigmeaj popoloj,

Batva-oj kaj Baka-oj malsimile evoluis. Se la nuna homo grandiĝas, ĝi ankaŭ dikiĝas! Dikeguloj konsistigas 38 procentojn de la loĝantaro en Usono, 30% en Japanio kaj 18% en Francio. Kial? – 1) Ĉar infanoj sidas dum horoj ĉe ekranoj kaj ne sufiĉe moviĝas. Ili ne plu iras (eĉ kuras) al la lernejo, sed veturas! Mia avino piediris 7 km al la ununura lernejo de la

vilaĝo; ĉar ne estis lerneja manĝejo, ŝi portis pecon da pano kaj cepon por tagmanĝo. Tiu situacio ankoraŭ estas aktuala en multaj partoj de la mondo. – 2) Ĉar ili manĝas tro da graso kaj tro da sukero. Multaj ŝatas

la usondevenajn sukerigitajn trinkaĵojn, dum plej bona estas akvo; manĝas “rapidajn” manĝojn el pano, graso, saŭco – dum prefere estas manĝi legomojn kaj fruktojn. Tio estas aparte videbla en Japanio, kie junuloj ne plu manĝas “tradicie” fiŝaĵojn kaj rizon, sed nutras sin usonece. En Francio, kampanjo⁽³⁾ reklamas “manĝi-moviĝi” (www.mangerbougier.fr) kaj simplan dieton⁽⁴⁾: manĝi ĉiutage minimume 5 legomojn kaj fruktojn; ĉe ĉiu manĝo cerealojn (pano, rizo, nudeloj, terpomoj, fazeoloj kaj simile); 3- aŭ 4-foje tage laktajojn (lakto, jogurto, fromaĝo); 1- aŭ 2-foje tage viandaĵojn aŭ fiŝaĵojn. Sed ĉefe, redukti la grason kaj la sukerojn. Eĉ se dum televidelsendoj aperas allogaj reklamoj pri pretaj frandaĵoj... Rekomendas la kampanjo sportumi, rapide paŝi, supreniri per ŝtuparo kaj ne per lifto, bicikli al la lernejo, naĝi, promeniĝi la hundon ktp. Skribu al ni, ĉu en via lando ekzistas sama kampanjo, kion vi matenmanĝas, tagmanĝas kaj vespermanĝas: triolle.renee@wanadoo.fr

⁽¹⁾Genetiko: scienco, kiu studas kiel transdoniĝas karakteroj de patro al filo. ⁽²⁾Ulno: longa osto inter la mano kaj la kubuto; ankaŭ iama mezuro, kiu variis laŭ regionoj de 0,50 cm al 1 m. ⁽³⁾Kampanjo: aro da agadoj por influi la opinion de la publiko. ⁽⁴⁾Dieta: maniero sin nutri.



Legu kaj ĝuu

Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
malgosia.
junaamiko@gmail.com



Konakrio – la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro 2017

Respubliko Gvineo.
Antaŭe ĝi estis fiŝista
vilaĝo kaj dinamike
ĝi komencis disvolviĝi
post la Dua Mondmilito
– kaj precipe post atingo
de la sendependeco en
la jaro 1958.

Konakrio, la ĉefurbo de Gvineo,
estas de la 23-a de aprilo 2017 la
Tutmonda Ĉefurbo de la Libro.
Kial Konakrio? Pro kelkaj kialoj.

Gvineo estas lando, kiu ĝis
antaŭ nelonge luktis kontraŭ
la epidemio de ebolo kaj en kiu
estas la plej alta analfabeteco
en la mondo. La loĝantoj de
la lando interkompreniĝas
per multaj afrikaj lingvoj. La
francan, t.e. la deivan ŝtatan
lingvon, oni lernas nur en la
lernejo. Malgraŭ ke edukado
en Gvineo estas deviga kaj
senpaga, ne ĉiuj infanoj povas

lerni. Iliaj gepatroj ne havas monon por
aĉeti lernolibrojn, lerneajn akcesorajojn
aŭ pagi veturadon. Tial en Pollando,
en Vroclavo (pole *Wrocław*), kiu estis
pasintjare la Tutmonda Ĉefurbo de la
Libro, oni decidis kune kun Unesko helpi
al Gvineo venki analfabetecon, donacante
100 000 ekzemplerojn de abolibro, por
ke afrikaj infanoj lernu legi kaj skribi.



Aprile Rafał Dudkiewicz,
la urbestro de Vroclavo,
transdonis la vojaĝantan
skulptaĵo-simbolon de
la Tutmondaj Ĉefurboj
kaj provokzempleron
de la abolibro al la
prezidanto de Gvineo kaj la
guberniestro de Konakrio.

La aŭtorino de la
skulptaĵo-simbolo estas Hedvy Ser, fama
franca artistino, kiu en la jaro 2011
ricevis prestiĝan titolon “Unesko-Artisto
por la Paco”. La skulptaĵo-
simbolo estas nova tradicio,
kiun proponis la vroclavaj
organizantoj de la pasintjara
Tutmonda Ĉefurbo de la Libro.
La abolibro estas atestita
franca lernolibro, en kiu
troviĝos ankaŭ kelkdeko da
polaj versaĵoj por infanoj,
tradukitaj en la francan. La
kovrilpaĝon projektis Sara,
lernantino de la vroclava
bazlernejo, kiu gajnis la





Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas dank' al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo sendu al la supra adreso maldekstre, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.

Rekomendo



Por la Biblioteko de *Juna Amiko* mi rekomendas la libron de Jean-Pierre Ducloyer "Bretonaj fabeloj".

Rekomendante la libron, Perla Martinelli, akademiano, skribis:

"Se vi volas malstreĉiĝi, forgesante dum vespero la zorgojn de la ĉiutaga realo, profitu la etan bukedon, kiun Jean-Pierre Ducloyer amare rikoltis sur sia tero.

La projekto ne celas renversi la mondon, sed simple memori, ke iam ekzistis aliaj mondoj, veraj aŭ imagitaj."

La aŭtoro en la antaŭparolo skribas, ke la libreto "penetrigas la leganton en la animon de tiu malfekunda lando, iam plejparte el arbaroj kaj erikejoj. En la pasintaj tempoj, homoj ne havis televidon por okupi la longajn vintro-vesperojn, kaj distraĵoj estis maloftaj. Tial ili kunvenis aŭ familie aŭ vilaĝe antaŭ fajrujo, kaj maljunulo rakontis fabelojn, kiujn li mem aŭdis de la patro aŭ de la avo. Tiuj fabeloj estis neniam lacigaj."



unuajn premiojn en la konkurso de "la kovrilpaĝo de la abocolibro por la infanoj el Konakrio en Gvineo". La kovrilpaĝo prezentas mapojn de Pollando kaj Gvineo, solidaran manpremon de la homoj el tiuj ambaŭ landoj, literojn (la simbolo de la abocolibro) kaj la vrocslavan urbodomon (la plej konatan simbolo de la urbo Vroclavo).

Ĉi tiu escepta abocolibro estos eldonita danke al la mono ne nur de ŝtataj aŭ privataj organizaĵoj de Unesko, sed ankaŭ de individuaj sponsoroj. Oni antaŭvidas, ke ĝin oni uzos dum kelkaj jaroj kaj do taŭgos por apenaŭ 500 000 unuaklasanoj el Konakrio. La infanoj el Gvineo ricevos la lernolibrojn aŭtune antaŭ la komenco de la lernojaro.


Danke al tio, ke Konakrio fariĝis la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro, en la urbo oni konstruis Nacian Bibliotekon. Ĝi tamen havas tre modestan librokolekton – kaj tial la organizantoj de la Tutmonda Ĉefurbo de la Libro 2016 en Vroclavo apelaciis al ĉiuj, kiuj povas helpi kaj donaci librojn en la franca por krei solidan librokolekton por la nova Nacia Biblioteko en Gvineo. En Vroclavo ankaŭ oni pripensas atingebli pli polan sistemon, kiu faciligos katalogi la librokolekton en la biblioteko. Vidu ankaŭ <http://arttransparent.org/en/event/books-for-guinea/> (Rim. de la red.)





Luiza Carol

La plej grava libro



Tiu ĉi historio okazis en la komenco de la dudeka jarcento.

D-ro Printempo estis tre maljuna kuracisto, kiu vivis en bela urbo de Ĉinio. Li estis spertulo pri dietiko kaj akupunkturo. Ekde kiam li pensiigis, li ne plu vizitis pacientojn. Liaj eksaj lernantoj, kiuj intertempe fariĝis junaj kuracistoj, ofte vizitis lin por ricevi utilajn konsilojn, pruntepreni librojn aŭ simple babili kun la saĝa kaj amikema maljunulo. Kelkfoje tiuj junuloj rakontis al li pri tre novaj kuracmetodoj kaj ankaŭ alportis al li novajn librojn, ĉar d-ro Printempo estis ĉiam scivola pri novaĵoj. Pli kaj pli ofte d-ro Printempo mem bezonis akupunkturitan terapion. Liaj eksaj lernantoj tre bonvole helpis lin pri tio; ili ĝojis pruvi tiamaniere siajn amon kaj dankemon.

Ne nur kuracistoj vizitis lin. Li havis multajn familianojn kaj geamikojn, kiuj profitis de liaj spertoj, kiam li estis juna, kaj nun ĉirkaŭis lin ame kaj respektoplene. Ofte ili kantis por li malnovajn kantojn, kiujn d-ro



Printempo amis, kaj ili akompanis sin per muzikinstrumentoj. Inter liaj geamikoj troviĝis multaj eksterlandanoj, ĉar en sia juneco d-ro Printempo vojaĝis multe, gastis kaj ankaŭ gastigis multe. Krom la ĉinan, kiu estis lia denaska lingvo, li scipovis ankoraŭ kelkajn etnajn lingvojn kaj Esperanton, tial li korespondadis en kelkaj lingvoj kaj ankaŭ kolektis librojn en kelkaj lingvoj. Krom fakajn librojn pri medicino li havis beletraĵojn el la tuta mondo, librojn pri diversaj religioj kaj filozofioj, pri vegetarana kuirado, muziko, pentroarto, fizikaj ekzercoj k.a. En preskaŭ ĉiuj libroj troviĝis etaj paperoj, enhavantaj notojn kaj komentojn fare de la doktoro mem aŭ de aliaj legintoj. Kaj en multaj libroj troviĝis ankaŭ belaj paĝomarkoj, broditaj aŭ pentritaj. Kelkajn el ili pentris la doktoro mem, en sia junaĝo. Multajn librojn li ricevis de geamikoj, kiuj skribis belajn dediĉojn sur la unuan paĝon. Kelkaj libroj havis du aŭ eĉ tri dediĉojn, ĉar li ricevis ilin de geamikoj, kiuj siavice ricevis ilin de siaj geamikoj. Parton el la libroj li heredis de siaj gepatroj aŭ de siaj pli maljunaj gefratoj. Tiuj libroj havis dediĉojn, adresitajn al liaj parencoj, subskribitajn de ties geamikoj, kiujn li ne ĉiam konis. Tutan historion pri amo kaj amikeco entenis lia libraro...

Sed la tempo pasis. Iom post iom d-ro Printempo malfortiĝis. Li preskaŭ neniam suferis pri doloroj, ĉar liaj junaj



kolegoj bonege zorgis pri tio. Tamen li bezonis pli kaj pli multan ripozon kaj silenton. Li jam akceptis nur malmultajn gastojn, pli kaj pli malofte. Li ne plu pruntedonis librojn; li donacis ilin al tiuj, kiujn li amis. Li pasigis multan tempon sola, trafoliumante siajn karajn librojn antaŭ ol donaci ilin. Li skribis sur la unuajn paĝojn varmajn kortuŝajn dediĉojn (ofte aldonitajn al antaŭaj malnovaj dediĉoj) kaj ame donacis siajn librojn unu post la alia. La librobretaroj pli kaj pli malpleniĝis, kaj la librojn anstataŭis florpotoj. S-ro Printempo ne emis admiri florojn, senigitajn de radikoj kaj velkiĝantajn en vazoj. Li preferis potojn kun bona grundo, en kiuj liaj plantoj kreskis kaj ekfloris, vivante tiom longe kiom eblis. Tiuj plantoj ĝuis la sunon, enirantan la ĉambron tra grandaj fenestroj, kaj dum someraj tagmezoj, kiam la lumo estiĝis troa, delikataj kurtenoj protektis ilin.

Post kiam neniu libro troviĝis sur la bretaroj, d-ro Printempo komencis pasigi longan tempon, meditante inter siaj floroj pri la homoj kaj la libroj kiujn li amis en sia vivo. Iamaj amikoj kaj libroj ofte enigis liajn sonĝojn, dum la pli kaj pli multaj horoj, kiujn li pasigis dormante. Unu nokton aperis en lia sonĝo tiu fascina ĉina poeto kaj filozofo, vaste konata en la tuta mondo laŭ sia kromnomo: La Maljunulo. En la sonĝo La Maljunulo ŝajnis la spegula imago de la doktoro. Li ridetis afable kaj etendis la manon al la doktoro.

“Ne timu,” – diris La Maljunulo – “eĉ milkilometra vojaĝo komenciĝas per ununura paŝo.”

La doktoro vekigis kun profunda emocio. Li parkeris tiujn famajn vortojn de La Maljunulo en sia infanaĝo, sed nun la samaj vortoj akiris pli profundan signifon por li. Longtempe li meditis pri

tiu sonĝo. Finfine li serĉis en sia ŝranko malnovan kartonan skatolon. Tie, inter malnovegaj fotoj kaj desegnoj, troviĝis flava eluzita libro. D-ro Printempo estis ĉirkaŭ kvin-jaraĝa, kiam li ricevis de sia patro tiun libron. Nun li malfermis ĝin per tremantaj manoj. Sur la unua paĝo videblis la vortoj, kiujn lia patro skribis tiam: “Tiu ĉi estas la plej grava libro de via vivo”. Inter la bildoplenaj paĝoj la doktoro trovis kartonan paĝomarkon, sur kiun li mem desegnigis floreton iam, per sia mallerta mano de eta infano. Sur la dorsa flanko la paĝomarko blankis, kvazaŭ ĝi atendus ke oni aldonu al ĝi ion.

D-ro Printempo aliris sian skribotablon kaj kaligrafiis per peniko sur la blankan flankon de la paĝomarko la faman aforismon de La Maljunulo: “Mil-kilometra vojaĝo komenciĝas per unu nura paŝo.”

Longtempe li trafoliumis la karan libron. Poste li enmetis la paĝomarkon en ĝin kaj lasis ĝin sur la skribotablo.

Tiuvespere La Maljunulo denove vizitis lin en sonĝo kaj denove etendis al li la manon. Kuraĝe, scivole, trankvile, serene, d-ro Printempo faris la unuan paŝon sur la nova nekonata nebula vojo. Post tiu sonĝo la doktoro neniam vekigis.

La sekvan tagon, kiam la gefiloj de d-ro Printempo eniris la floroplenan ĉambron, nur ununura libro troviĝis tie, sur la skribotablo. Ĝi estis la unua abocolibro de ilia patro.






Renato Corsetti:

Rajdi sur leono estas danĝere kaj traduki al Esperanto estas malfacile

La *Fundamento* instruas, ke rajdi sur leono estas danĝere, ne por informi pri la danĝero de leonoj, sed por informi pri la uzo de la finaĵo -e post frazo, en kiu la subjekto estas verbo. Mi sekvas tiun modelon, sed por vere diri ke tradukado al Esperanto estas io malfacila.

Tradukanto al sia nacia lingvo fakte scias tion, kion liaj samlingvanoj scias pri la kulturo, ligita al la lingvo, el kiu li tradukas. Tradukanto al Esperanto, kiu celas principe tutmondan legantaron, ne scias kaj sekve li devas kion eble plej multe klarigi la kulturajn aludojn, kiuj enestas en la originalo. Iam mi legis japanan libron, en kiu iu diris al iu alia ion sub la arkaĵo de la enirejo de templo. Tio havis klaran signifon por japanaj esperantistoj, sed neniun signifon por mi. De tiam mi ĉiam demandas min, kion komprenas mongolo, kiam mi tradukas al Esperanto poemojn originale en dialekto de italaj regionoj.

Post tio mi prezentas al vi la tradukojn de du sonetoj de Giuseppe Gioachino Belli en la dialekto de la urbo Romo. Li (1791-1863) estis unu el la grandaj italaj poem-verkistoj de la 19a jarcento. Li skribis en la dialekto de Romo 2279 sonetojn, kiuj fidele reprezentas la roman popolon. Dum longa tempo lia valoro estis nekonata ankaŭ de italaj literaturistoj kaj nur en la lastaj 50 jaroj li estis laŭgrade malkovrita. Se li



estus verkinta en la angla pri la anglaj malsuperaj klasoj, li povus rivali kun Ŝekspiro. Kompreneble tradukoj de liaj poemoj al aliaj lingvoj estas aparte malfacilaj kaj la tradukintoj al la angla aŭ al la franca provis inventi artefaritajn dialektojn. En Esperanto ni simple helpas nin per piednotoj.

Sen titolo

*Zenajde, graf-edzino de Volkonski⁽¹⁾,
vi volas igi min danĝere riski,
oni provos al mi telerojn diskis,
ĉar neniun kapablos min agnoski.*

*Mi lernis versi sed ne arabeski
kaj devas ofte min protekte maski,
ĉar mi vidas bastonojn min embuski
kaj devas fuĝi for por ne groteski.*

*Mi nur en Romo povis daŭre kreski,
kaj do ne povas vorte ŝajn-etruski⁽²⁾
kiel vi aŭ sinjoro Viaseski⁽³⁾.*

*Sufiĉas! Venis tempo nun ektaski,
por fine viri kaj ne nur moluski
kaj sekve ĉu karesmi, ĉu eĉ paski⁽⁴⁾.*



La bona tago de nova jaro

Bonan jakon⁽¹⁾, al vi, onjo Maria!
 Vi ne respondas. Certe io jukas.⁽²⁾
 Hodiaŭ estas tago idilia,
 hodiaŭ varmas, dolĉas kaj eĉ kukas.
 Mi jen revas pri revo iluzia:
 mi kaj vi kaŝas nin kaj kune trukas.⁽³⁾
 Faron belan de nun, pro volo dia,
 vi daŭre tra la tuta jaro plukas.⁽⁴⁾
 Hodiaŭ ĉio estu en du-aro.
 Kaj paradize Dio jam decidis:
 manĝos duoble nia sanktularo.
 Kial, do, ekestis papa jubileo?
 Ĉar eĉ Jesuon oni cirkumcidis,
 kaj la filo de Di' iĝis hebreo.⁽⁵⁾


(1) Bonan jakon! estas ŝerca formulo por Bonan Jaron!

(2) Io jukas = Vi estas malbonhumora.

(3) Kune trukas = evitesprimo por havi seksan rilaton.

(4) Tra la tuta jaro plukas. Popola kredo, ke tio, kion oni faras en la unua tago de la jaro, ofte oni faras tra la tuta jaro.

(5) La filo de Di' iĝis hebreo. Evidente popolanoj havis tre konfuzitajn ideojn pri la rilato inter la religioj kaj kial oni cirkumcidis Jesuon, kion oni faras al judoj kaj ne al kristanoj.



(1) La poemverkisto, invitita al festo en la vilao de la rusa princino Zenaide Wolkonsky, kiu loĝis en Romo, kaj oni petis lin improvizi soneton. Li sidiĝis kaj produktis soneton, komplete rimitan per "-ski", laŭ la finaĵo de multaj slavaj nomoj.

(2) "etruski" = verki kiel etrusko, popolo loĝinta norde de Romo, kaj eventuale parolinte pli elegantan literaturan lingvon.

(3) Alia fama invitito al la vespermanĝo.

(4) Karesmi aŭ paski = fasti, kiel katolikoj faras dum la antaŭpaska periodo de Karesmo, aŭ abunde manĝi kiel oni faras en Pasko. La verkisto volas esprimi sian dubon pri tio, kio okazos, kiam la poemo estos legita kaj juĝita malbona aŭ bona.



La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



**Kanto akompanas nin ĉie...
Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi
helpas vidi kaj krei alimaniere
la mondon, ebligas revii aŭ
transdoni niajn sentojn.**

Gi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj rememorigas kanto-vortojn. Tiamaniere la lernantoj plej bone kaj sugeste alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo.

La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj; do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj. Mi proponas ĉi-foje kune ekkanti la kanton "En la mondo", kiun prilaboris Irena Łowińska. La kanton vi trovos el la kantaro "Vivu la kanto" de Tom Verwoerd (forpasinta nederlanda esperantisto). La kanton por la legantoj de *Juna Amiko* elektis la konata kuba esperantisto Jose de J Campos Pacheco. Li uzas ĝin, instruante Esperanton.



En la mondo

*En la mondo estas lando,
en la lando estas urbo,
en la urbo estas parko,
en la parko estas domo.*

*En la domo estas ĉambro,
en la ĉambro estas ŝranko,
en la ŝranko estas sako,
en la sako estas mapo.*

*Sur la mapo estas mondo,
en la mondo estas lando,
en la lando estas urbo...*


Bonvolu respondi jenajn demandojn:

1. Ĉu estas parkoj en via urboj? Kiom da?
2. Kiom da ĉambroj estas en via domo?
3. En kiu kontinento troviĝas via lando? Ĉu vi povas montri ĝin sur la mapo?
4. Desegnu vian urbon, domon, ĉambrom, kaj viajn plej bonajn amikojn, al kiuj vi kantas tiun ĉi kanton.

KANTU kaj LERNU

Viajn respondojn interrete sendu al mi, por ricevi valorajn premiojn, kiujn fondis pola organizaĵo Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo.



1. En la mondo estas lan-do, en la
lan-do estas ur-bo, en la urbo estas
par-ko, en la parko estas do-mo.



En Vroclavo oni kantis Esperantajn kantojn



Eŭropa Festivalo
de Esperantaj Kantoj
Europejski Festival Piosenki Esperanckiej

La 20-an kaj la 21-an de majo 2017 okazis jam la 5-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

La ĉefa organizanto estis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, kiu ĉi-jare kunlaboris kun neesperantaj organizaĵoj *Centrum kultury wrocław-zachód*, *Klub muzyki i kultury* kaj *Dolnośląskie stowarzyszenie "horyzont"*. La festivalon patronis Marŝalo de Malsupra Silezia Vojevodio Cezary Przybylski, Universala Esperanto-Asocio, Eurokka, Pola Esperanto-Asocio, Mila Van Der Horst Kolińska kaj D-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof. Laŭ la regularo partoprenis infanoj, junuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj. Ĉiu partoprenanto kantis du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estis nur Esperantaj kantoj. La Festivalo okazas ĉiujare en majo en du kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto.

La ĵurio konsistis el specialistoj-esperantistoj Małgosia Komarnicka el Pollando, Stefan MacGill el Novzelando kaj esperantistoj-muzikistoj Jean-Marc Leclercq (la prezidanto de ĵurio el Francio), Floréal Martorell el Francio kaj Carsten Schnathorst el Germanio.

Dimanĉe la 21-an de majo okazis

la Koncerto de la Premiitoj en *Centrum kultury wrocław-zachód*. La publikon kaj la partoprenantojn salutis la iniciatintino de la festivaloj Małgosia Komarnicka, kiu ankaŭ mallonge prezentis regularon de la festivalo. Akompanis ŝin E-kantisto kaj posedanto de Guinness-

rekordo jOmO, kiu kune kun Kaŝi fine de la koncerto kantis kelkajn kantojn. La famaj kantistoj tiel dancige kantis, ke la publiko, ĝuante belajn kantojn en Esperanto, dancis sur la scenejo kaj apud ĝi. La unuan premion en la kategorio "solisto" ĝis 18 jaroj ricevis Oktawia Nowak, en la sama kategorio de 19 ĝis 54 Wojciech Ławnikowicz kaj super la aĝo 55 Laurento Peuch. La unuan premion en la kategorio "koruso aŭ ensemblo" ĝis 18 jaroj ricevis infankoruseto "Skoczne nutki" kaj super la aĝo 55 jaroj la koruso "Okropy". La premiitoj ricevis diplomojn, pokalojn kaj volumetojn de poezio, donacitajn de Halina Kuropatnicka-Salamon, kaj de Stefan MacGill E-lernolibrojn kaj la revuojn "Juna Amiko". Ĉiuj partoprenantoj ricevis diplomon pro la partopreno. La ĵurio aljuĝis ankaŭ premion pro akompanado, kiun ricevis Wojciech Ławnikowicz.

La organizantoj taksis ankaŭ penan laboron de tradukistoj, kun kiuj ili kvin jarojn kunlaboras. Distingitaj estis Halina Kuropatnicka-Salamon kaj Edward Edulo Wojtakowski.

Ni invitas vin al Vroclavo en 2018 partopreni en la 6-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kiu okazos la 19-an kaj la 20-an de majo. **Małgosia Komarnicka**





Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo "Betuleto"
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
lena_espero@mail.ru



Niaj du kongresoj en Suda Koreio

Saluton, karaj legantoj!

Jam estas kutime, ke en la septembra numero, kiam finiĝas someraj ferioj, *Interkultura Mondo* raportas pri la plej gravaj eventoj ene de Esperantujo. Inter ili, sendube, la unuajn vicajn okupas la tri ĉefaj Esperanto-kongresoj: la Universala Kongreso, la ILEI-kongreso kaj la Internacia Junulara Kongreso.

Ĉi-numere nia rubriko prezentas du el ili – Universalan Kongreson kaj la ILEI-kongreson. Ambaŭ okazis en la sama lando – en Suda Koreio. La UK okazis en Seulo – la ĉefurbo de la Korea Respubliko, la 22-29-an de julio. La ILEI-kongreson gastigis Busano, la dua plej granda urbo de Sud-Koreio, la 15-22-an



Inaŭguro de la Universala Kongreso en Seulo, prezento de la podianoj.



Movada Foiro dum la UK, redaktoro de la revuo *Esperanto* Anna Striganova.

de julio. Do, la gastiganta lando du-foje sinsekve renkontis gesamideanojn el la tuta mondo. La kvanto de la partoprenantoj estis en ambaŭ kongresoj multnombraj, en la ILEI-kongreso eĉ rekorda! Al la UK en Seulo aliĝis kaj partoprenis 1174 personoj el 62 landoj. La ILEI-kongreso en Busano allogis 196 aliĝintojn el 29 landoj, partoprenis 170 el 25 landoj. Por ILEI-kunveno tio estas granda atingo! Ni povas konstati, ke dum la lastaj jaroj la kvanto de niaj konferencanoj/kongresanoj konstante kreskas. Kaj tio, certe, tre ĝojigas ĉiun membron de la Ligo.

Tamen unuigas ambaŭ kongresojn ne nur la sama landloko kaj multnombra partoprenantaro. Unue necesas menciigi la temojn de la du ĉefaj kongresoj de Esperantujo. La UK-temo estis "Turismo kaj evoluo: vojoj al daŭripovo". La ILEI-kongreso traktis la temon "Edukado al respekto plena



turismo". Tiu-ĉi simileco certe ne okazis hazarde. Ambaŭ temoj estis ligitaj kun la agado de Unesko. Ĝi anoncis la jaron 2017 kiel la Jaron de Turismo. En la moderna mondo turismo plenumas pli kaj pli gravan rolon. Laŭ la Monda Organizo de Turismo (MOT) internaciaj vojaĝoj atingos preskaŭ 1,6 miliardojn jam dum la jaro 2020. Do, turismo devas esti bone administrata, por ne kaŭzi gravajn damaĝojn al la medio. Tial Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2017 Internacia Jaro de Daŭrigebla Turismo-Disvolvigo.

Por esperantistoj evoluo de respektplena turismo havas gravan signifon. Ja nia lingvo mem estis kreita kiel universala pontolingvo, neŭtrala kaj respektplena por ĉiuj popoloj. Do, la ideo estas la sama. Krome, esperantistoj multe vojaĝas. Kaj, sekve ili havas la ŝancon esprimi sian respekton al iu ajn gastiganta lando kaj popolo. Verŝajne ankaŭ pro tio la ĉi-jaraj kongresoj allogis tiom da partoprenantoj.

Ambaŭ kongresoj rajtas fieri pri siaj altaj protektantoj. Inter ili estis: Vicestro de la Parlamento de la Korea Respubliko, Ambasadoro de Korea Respubliko ĉe Vatikano, Ĝenerala Sekretario de Korea Nacia Komisiono por Unesko, urbestroj de

Seulo kaj Busano, Estro de Dongdaemungu-distrikto de Seulo, Guberniestro de edukado en metropola urbo Busan, Prezidanto de Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj en Seulo, Estro de Organizo de Korea Turismo, Prezidanto de Asocio por Promocii Internacian Interŝanĝon, Estro de la Asocio por la Konservado de la Korea Imperia Familio, Prezidanto de Busana Turisma Organizo kaj eĉ Subadmiralo de la Mararmeo de Korea Respubliko, submarŝipa komandoro. Jen kiom impona listo ĝi estas! Niaj koreaj samideanoj sukcesis akiri grandan ŝtatan apogon – financan kaj moralan. Ni gratulu ilin pro tiu grava agnosko de Esperanto ĉe la ŝtataj instancoj de Sud-Koreio!

Danke al tiom altnivela protektado la partoprenantoj de la UK en Seulo rajtis, interalie, viziti la Parlamenton de Korea Respubliko. Tie pasis Pontkunveno "Unuiĝo Koreio". 130 partoprenantoj el 21 landoj diskutis pri la gravaj por la lando problemoj – nome pri la unuiĝo de la du koreaj ŝtatoj. Ne ĉiu kongreslando kapablas disponi tiomnivelan programeron, ĉu?

Dum la kunveno salutis diskutantojn koreaj parlamentanoj en Esperanto, kio vekis abundajn aplaŭdojn de ĉiuj esperantistoj.



Prezento de koreaj dancoj en Lingva Festivalo, dum la ILEI-Kongreso en Busano.





pri la Afrika Esperanto-movado, pri eksteraj rilatoj de Esperantujo.

Dum la UK renkontiĝis kaj interparolis sciencistoj, matematikistoj, komercistoj, juristoj, ĵurnalistoj, radioaŭskultantoj kaj aliaj fakuloj – ĉiam, certe, pere de nia pontolingvo.

Dum ambaŭ kongresoj okazis diversnivelaĵ Esperanto-kursoj, gvidataj

Kaj poste la tuta diskuto okazis en nia lingvo. Jen vera pruvo, ke Esperanto estas paciga lingvo, ĉu ne? Do, ni deziru al niaj koreaj samideanoj la plej rapidan solvon de iliaj problemoj laŭ la volo de ĉiu popolo!

La programoj de ambaŭ kongresoj estis abundaj kaj bonkvalitaj. Dum la UK samtempe okazis eĉ 6 programeroj! Do, malfacilis por la kongresanoj elekti. Seriozaj prelegoj, preparitaj de la altnivelaj profesoroj kaj specialistoj, prezentis diversajn fakojn de sciencoj, traktis multajn sociajn, kulturajn kaj lingvajn aferojn. Jen nur kelkaj titoloj: Akademio de Esperanto, Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), Tutmonda Civitaneco, Ĝemelaj urboj, Entreprenado en Esperantujo, Esperanto-Sumoo, Internacia Kongresa Universitato (IKU) kaj multaj aliaj. Dum la ILEI-kongreso en Busano en fokuso estis unuavice instruista trejnado kaj aliaj programeroj, ligitaj kun edukado kaj Esperanto. Estis prezentitaj multaj konataj internaciaj kaj interkulturaj projektoj de Esperantujo: Ekparolu!, Amikumu, TEO kaj AMO, junularaj projektoj de TEJO.

Multe kaj fruktodone laboris la kongresanoj kadre de diversaj Esperanto-agadoj. Kunsidis kaj respondis la demandojn la Komitato, la Estraro kaj la Centra Oficejo de UEA. Estis prezentitaj Jarraporto-2016 kaj Strategia Plano 2017-2020. Publike kunsidis Komisiono pri Azia Esperanto-Movado kaj Sennacieca Asocio Tutmonda. Okazis Esperantologia konferenco; oni diskutis

de eminentaj instruistoj. Fine de la UK la lingvolernintoj povis montri siajn kapablojn ĉe la KER-ekzameno. Al ĝi aliĝis 25 personoj el 16 landoj. La plej multaj kandidatoj venis el Koreio. La favorata nivelo estis C1, je kiu ekzameniĝis 15 kandidatoj. Kiel menciis la UK-gazeto, kun tiuj ekzamenitoj nia internacia ekzamen-sistemo akiros jam 2000 KER-diplomitojn! Jen ankaŭ bona atingo de Esperanto! Gvidis la ekzamensesion Katalin Kováts.

Amantoj de interparolado povis ĝui diverstemajn konversaciojn: pri tio, kio estas feliĉo, kiujn perspektivojn havas tutmonda estonteco, pri nekutimaj muzikoj kaj efika komunikado. Okazis sciencaj forumo kaj kafejo, Movada kaj Pedagogia foiroj, Belarta kaj Oratora konkursoj, tuttempe funkciis diverstemaj ekspozicioj kaj libroservoj. Dum la UK okazis granda manifestacio pri Esperanto en Seulo.

Dum la ILEI-kongreso en Busano okazis tradicia Lingva Festivalo por la ekstera publiko. Ĝi pasis surstrate ĉe la granda kinejo en la centro de Busano. Samtempe tie okazis granda Internacia filmfestivalo. Do, la ideo en ambaŭ kongresoj estis allogi kiel eble plej vastan publikon kaj prezenti al ĝi abundecon de la mondaĵ ingvoj kaj kulturoj kaj Esperanton kiel ponton inter ili kaj terglobaj popoloj.

La sporta parto de la programo inkluzivis diversajn movspecojn, interalie aikido-n kaj futbalan matĉon. Dum la ILEI-kongreso



en Busano la partoprenantoj povis naĝi kaj hardiĝi en la Orienta Maro.

Dum ambaŭ kongresoj tradicie pasis gajaj bankedoj kaj baloj kaj estis organizataj aŭkcioj – por la Volontula Fondaĵo de UEA kaj por la afrikaj kaj aziaj samideanoj de ILEI kaj TEJO.

Ĝenerale niaj koreaj samideanoj perfekte kaj brile organizis ambaŭ kongresojn – de UEA kaj ILEI. Ĉio pasis glate kaj laŭ la planitaj programoj. Ĉiuj aperintaj demandoj solviĝis rapide, tre amike kaj favore por la kongresanoj. Dum la preparado kreiĝis tre organizita kaj lerta teamo – malgraŭ sufiĉa distanco inter Seulo kaj Busano. Bone ekipitaj salonoj, imponaj haloj, komfortaj kunvenejoj kreis kvazaŭ hejman etoson. Dum la UK funkciis *Kongresa Kuriero* – konstanta dumkongresa informilo. Ĝi nomiĝis “La Kandellumo Verda” kaj sciigis ĉiujn programŝanĝojn, raportis pri la intaj kaj ontaj okazaĵoj. Tiamaniere ĝi tre helpis kongresanojn pli bone orientiĝi kaj agrable kongresi.

Aparte indas rakonti pri la kultura programo de ambaŭ kongresoj, kiu estis tre varia kaj abunda, unuavice la nacia. Ĝi estis brile prezentita dum preskaŭ ĉiu vespero, precipe dum la ILEI-kongreso. La partoprenantoj en Seulo kaj Busano ĝuegis magiajn koreajn dancojn, kantojn, teatraĵojn, popolartojn, famajn batalartojn. Vere mirindaj naciaj vesperoj okazis en Seulo kaj Busano! UK-anoj ĝuis du grandiozajn naciajn vesperojn, studis Gruo-dancon, funkciis internacia koruso. La ILEI-kongresanoj en Busano ĉiuvespere spektis koreajn kulturajn prezentaĵojn, abunde gustumis tradiciajn koreajn manĝaĵojn, speciale preparitajn por la Interkona Frandvespero kaj Nacia Vespero. Tuttempe en Busano kaj poste en Seulo funkciis Korea Kulturĉambro. Tie oni ankaŭ spektis koreajn artojn,

gustumis korean teon kaj naciajn manĝaĵojn.

Dum la UK estis prezentita serio de ĉiutagaj prelegoj pri Koreio: pri ĝiaj historio, geografio kaj kulturo. Dezirantoj povis lerni la korean lingvon dum “Korea Eksprese” en ambaŭ kongresoj.

Brila estis la koncerta programo. En la UK partoprenis Kajto, Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa, MAJU, la junulara teatra grupo el Ĉeĥio, multis koreaj artistoj. Niaj koreaj samideanoj sukcesis inviti multajn famajn Esperanto-grupojn tra la mondo.

Gejunuloj ĝuis sian junularan programon, gaje kaj amike pasigis la tempon. Dum la UK en Seulo paralele okazis IIK – Internacia Infana Kongreseto, jam la 46-a. Ĝi pasis en Junulara Trejnejo Bongdo en Seulo kaj kolektis 66 junajn esperantistojn. Por ili estis preparita speciala eduk-amuza programo kun la temo “Kolora mondo”.

Dum la Infana Kongreseto okazis olimpikaj ludoj, ekskursoj al koreaj tradiciaj palaco kaj vilaĝo, lernado de korea maskodanco, natura promenado, manlaboro, kantado, farado de magia suko, baniĝo kaj, kompreneble, Esperanto-kursoj. Vespere la IIK-anoj ĝuis artfajraĵon, enĝardenajn ludojn, kvizojn, teo-ceremonion kaj aliajn interesajn agadojn. Ankaŭ la infanoj eksterordinare spektis la UK-programeron ‘Nacia Vespero’. Tiel junaj esperantistoj konatiĝis kun la kulturo kaj arto de la gastiganta lando. Do, danke al tiom varia programo la infanoj de diversaj aĝoj kune ĝuis sian



Prezentado de tradiciaj koreaj kostumoj dum la UK en Seulo.



kunestadon: multe ridis, kantis, desegnis, dancis, ekskursis, skeĉis, lernis kaj, certe, interamikiĝis kaj “interkulturiĝis” – ĉu vi permesos krei tiun novan vorton, karaj legantoj?

Alloga estis, certe, la lando mem. Ne nur pro siaj belaj vidindaĵoj. Okazis fakte grandioza renkontiĝo de Oriento kaj Okcidento. Homoj el tute diversaj kulturoj spertis komuniki inter si per la neŭtrala lingvo Esperanto. Jen estas perfekta okazo praktike lerni la respektoplenan turismon, ĉu? Ni opinias, ke tiujn ĉi Esperanto-kongresojn eblas plenrajte nomi la plej interkulturaj eventoj de Esperantujo. Ĉu vi konsentas, karaj legantoj?

Sendube meritas rakonti pri la vidindaĵoj de Koreio. Ja ekskursaj partoj de la kongresoj ĉiam estis plen-plenaj (malgraŭ pluvoj kaj alta humideco).

Ĝenerale oni nomas Koreion la “lando de matena freŝo”. Ĝi mirinde unuigas antikvan korean kulturon kun supermodernaj teknikaj mirakloj. La kongresanoj ĝuis unikajn budhismajn templojn kaj belegajn palacojn, antikvajn fortikaĵojn kaj famajn muzeojn, folklorajn vilaĝojn. Pitoreskaj montoj kaj belaj parkoj ĝojigis okulojn.

Miraklaj estis la famaj teo-plantejoj en Boseong.

Kaj aparte alloga estis, sendube, la maro. Ĉie Koreio estas ĉirkaŭata de maroj. Busano, la urbo de la ILEI-kongreso, situas sur la bordo de la Orienta maro. Proksime de la kongresejo Arpina etendiĝis unu el la plej famaj plaĝoj de Koreio – Haeundae. Do, la ILEI-kongresanoj havis multoblajn plezurojn – pro la interesa programo, Esperanto-renkontiĝo kun konataj kaj novaj samideanoj kaj pro la naĝado en la maro. Indas aplaŭdi la organizantojn pro tiom trafa elekto de la loko por la unua ILEI-kongreso!

Konklude, ni gratulu denove tutanime kaj dankkore niajn koreajn kolegojn – la organizantojn pro ilia sindona laboro por du ĉefaj Esperanto-kongresoj! Kaj ni deziru al ili kaj al nia lingvo Esperanto daŭran respektoplenan evoluon kaj prosperon!

Kaj bonvenon al niaj sekvaj Esperanto-kongresoj! Vi ja vidas, karaj legantoj, ke indas kaj endas viziti ilin! La 103-a Universala Kongreso okazos en Lisbono, Portugalio, kaj la 2-a ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio. Nia rubriko sincere bonvenigas ĉiujn siajn legantojn kaj deziras: “Ĝis la renkontiĝo en Esperanto-kunvenoj!”



Komuna foto, ekskurso dum la ILEI-Kongreso en Busano. Fotoj: Liba kaj Floreal Gabalda



Internacia simpozio en Pollando

La 19-an de majo 2017 en Vroclavo en la salono de “J. Czekanowski en Collegium Anthropologicum” de Vroclava Universitato okazis dulingva altnivela simpozio.

La 3-an Internacian Simpozion preparis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kune kun Jolanta Małecka-Juchymiuk, emerita lekciistino de Vroclava Universitato.

La Honoraj Patronoj de la simpozio estis Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San-Marino, Universala Esperanto-Asocio, Rektoro de la Vroclava Universitato prof. Adam Jezierski kaj D-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof.

En la malferma ceremonio bonvenigon donis la rektoro Adam Jezierski, kune kun Małgosia Komarnicka, la reprezentantino de la organizantoj. Poste salutvortojn prezentis reprezentantoj de du honoraj patronoj de la simpozio. Por AIS prof. Reinhard Fössmeier laŭtlegis saluton de Amri Wandel, la prezidanto de AIS kaj por UEA salutis ĝia vicprezidanto Stefan MacGill.

Ĉi-jare la simpozio konsistis el du partoj. La unua estis dediĉita al “Kiel kreskis Esperanto kune kun ĝia kreinto” kaj la alia al “Vroclavo – Eŭropa Ĉefurbo de Kulturo”. En la unua parto esperantistoj proksimigis al la publiko informojn pri la historio de la lingvo Esperanto kun etleciono (Małgosia Komarnicka), pri rolo de denaskaj esperantistoj (Stefan MacGill), pri poezio kaj literaturo en Esperanto (Lidia Ligęza) kaj pri ebleco eduki en Esperanto en AIS San Marino (prof. Reinhard Fössmeier).

En la dua parto profesoroj de Vroclava Universitato prelegis pri ekumena Vroclavo (prof. Adam Jezierski), Eŭropo en la pola (prof. Jan Miodek), Pentraĵo de Cranach-oj (prof. Piotr Oszczanowski kaj direktoro de Nacia Muzeo en Vroclavo), teatra vivo en Vroclavo (prof. Janusz Degler kaj Kabineto en Teatra Muzeo) kaj pri muziko en Vroclavo (Joanna Subel kaj Muzika Akademio).

La simpozion resumis Barbara Despiney (Francio) kaj poste la rektoro Adam Jezierski gvidis nin al la Universitata Muzeo. En la baroka aŭlo “Oratorium Marianum” li ludis orgenon, kiu estis konstruita en 1718 de organmajstro Adam Honorato Casparini. La tagon finis solena vespermanĝo en la restoracio “U Hrabiego” (Ĉe Grafo) en Ossolineum, kiu ĉi-jare festas 200 jarojn de la ekesto. Antaŭ komenco de la simpozio en la revuo *Przegląd Uniwersytecki* aperis artikolo de Małgosia Komarnicka, en kiu la aŭtorino prezentis la 130-an datrevenon de la historio de la lingvo Esperanto kaj informojn pri la 100-a mortodatreveno de Ludoviko Zamenhof sub la aŭspicio de Unesko.

Aŭskultante prelegojn, tradukojn kaj babiladojn, dum kaj post la simpozio, oni povis konvinkiĝi, ke Esperanto bonege funkcias kaj scipovas transdoni ĉiaspacajn nuancojn de la homa pensado, eĉ la plej malfacilajn aŭ la plej mirigajn esprimojn. Ĝi havas propran literaturon kaj oni povas en ĝi kleriĝi, akirante sciencajn rangojn.

Małgosia Komarnicka



Barbara Despiney resumis la simpozion.





Luiza Carol

Ĉu vi ŝatas bildseriojn?

Se vi ŝatas bildseriojn, la kolekto de Liette Lêla ŝajnas vera trezoro al vi, sendepende de via aĝo. Laŭ mi ŝiaj bildserioj estas ĝojo por la okuloj, la animo kaj la menso.

Lia gaja humuro igis min ridi aŭ almenaŭ rideti kaj tial mi tutkore rekomendas ilin ankaŭ por altigi vian bonhumoron.

La Datreveno de la Leono ŝajnas al mi vera perlo de tiu ĝenro, kiu kapablas amuzi infanojn en infanĝardeno, sed mi kuraĝus rekomendi ĝin eĉ al universitataj studentoj en la fako pri politikaj sciencoj, same al iliaj profesoroj... Oni povas multe amuziĝi, trovante similaĵojn inter la kondutoj de nuntempaj politikistoj en diversaj landoj kaj la kondutoj de la Leono kaj la Zebrino en la bildserio de Liette Lêla. Mi konsideras la tekston tre bonkvalita fablo.

La Bonkora Sorĉistino estas gaja rakonto pri sorĉistino, kiu sukcesas venki la malbonajn antaŭjuĝojn de la infanoj rilate sorĉistinojn. Tiu bildserio, kiu kapablas gajigi infanojn, povus amuzi kaj pensigi ankaŭ plenkreskulojn, kiuj devis aŭ devas alfronti antaŭjuĝojn en la vivo. (Kaj verŝajne ĉiuj el ni alfrontas antaŭjuĝojn foj-foje, aŭ eĉ malkovras antaŭjuĝojn en sia propra pensmaniero...)

Beloka estas eduka rakonto pri knabino, kies sonĝo helpas ŝin kompreni, ke ĉiuj homoj maljuniĝas, kaj do ankaŭ ŝi maljuniĝos foje. Danke al la sonĝo Beloka komprenas, ke ŝia maljuna avino amas ŝin kaj meritas esti amata.

La Blateto kaj la Muso (teksto de Amir Naor) estas tre gaja fablo pri la sprita maniero,





laŭ kiu la Muso konvinkas la Blatinon pri la sincereco de sia amo, kaj sukcesas edziĝi al ŝi.

La Knabo Tinita (teksto de Amir Naor) estas ĉarma rakonto pri infano, kiu lernis Esperanton kaj uzas ĝin por amikiĝi kun infanoj de aliaj landoj. Tiu bildserio meritis esti tradukita en kiel eble plej multajn etnajn lingvojn, por disvastigi la avantaĝojn de Esperanto inter infanoj.

Kordoj de Harpo (teksto de Paŭlo Sergio Viana) estas bildserio pri la grandega valoro de la ekvilibro rilate al ĉiuj aspektoj de la homa vivo, ĉar ekvilibro signifas korpan, mensan kaj animan sanon.

Libereco de Kolomboj (teksto de Paŭlo Sergio Viana) ŝajnas al mi tre bonkvalita bildserio, kies teksto estas vere amuza kaj pensiga fabelo. Samkiel *La Datreveno de la Leono*; tiu bildserio povus amuzegi infanojn en infanĝardeno kaj ankaŭ pensigi plenkreskulojn pri nuntempaj moroj de diversaj politikistoj.

La kolekto de bildserioj de Liette Lêla inkluzivas ankaŭ erojn laŭ klasikaj fabeloj: *Birdo Fenikso* de Hans Christian Andersen kaj *La Tri Porkidoj* de Joseph Jacobs.

Ŝatantoj de proverboj kaj aforismoj, sendepende de la aĝoj, aprezos la diverslandajn proverbojn, arigitajn en *Bildserio de proverbaro*.

Alispeca ero de tiu kolekto estas *Dancanta kun ŝarkoj*. Temas pri riĉe ilustrita prezentado de la novelo de Julian Modest. Ĝi adresiĝas al plenkreskuloj kaj entenas pensigan dolorigan simbolon, kiu rememorigas min pri la aparta humuro trovebla en *La rinoceroj* de E. Ionescu.

Mi prezentis ĉi tie nur erojn, kiujn mi trovis en la retpaĝo <http://verkoj.com/verkistoj/liette-lela/> en julio 2017, sed mi supozas (kaj esperas) ke la bildserioj de Liette Lêla multiĝos kaj diversiĝos.

Bildserioj estas por instruistoj ege valoraj materialoj, malfacile troveblaj aliloke. Tial mi kaptas la okazon por gratuli kaj danki la verkiston Amir Naor pro lia bonega agado koncerne la tutan paĝaron *verkoj.com*. Tiu interesa (kaj espereble kreskonta) paĝaro estas tre utila virtuala Esperanta biblioteko, enhavanta ĉiujn ĝenrojn de literaturo.



Ekkonu mian landon pere de ĝiaj legendoj

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,

ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, malgosia.junaamiko@gmail.com



Ĉi-numere ni vizitos Bretonion, kiu estas regiono en nord-okcidenta parto de Francio. Ĝin bele priskribis maje, en Vroclavo (Pollando), Ĵerome, Lorento, Amapola, Chantal kaj Jade, dum Interkultura Majrendevuo.

Tij kvin esperantistoj en la lingvo Esperanto sukcese prezentis la francan regionon al la pola neesperantista publiko en Publika Biblioteko je la nomo Tadeusz Mikulski. Nun mi deziras prezenti al vi skizon de ilia prezento.

Kio allogas min en Bretonio?

Bretonio estas duoninsulo (Armoriko – lando ĉe la maro), situanta nordokcidente de Francio kaj ĉirkaŭata de la maro Maniko kaj la oceano Atlantiko. Geologie ĝi estas tre malnova montaro, havanta reliefon: montetoj, profundaj valoj, multegaj riveretoj, klifoj, kaboj kaj golfetoj, kiuj estigas belajn pejzaĝojn.

Grava fenomeno, kiun ni povas observi estas la eksterordinaraj altaj tajdoj ĉe



la marbordo. Dum la fortaj tajdoj la maro atingas altajn nivelojn kaj poste malflugas ĝis pli ol 12 metroj malsupren. Konsekvence sur ebena strando la maro malproksimiĝas je pluraj kilometroj!

Bretonio estas tipa regiono, kies civilizacio estas tre malnova. La homoj jam dum la prahistorio okupis tiun regionon. Ili bredis bestojn, kultivis tritikon kaj uzis efikajn ilojn el polurita ŝtono...

Dum la 5a jarcento a.K. alvenis keltaj popoloj, kiuj kunportis siajn teknikojn, religion kaj kulturon. Ili bone prilaboris la metalojn kaj kapablis konstrui velŝipojn. Sekve komenciĝis la romia periodo, kiu daŭris 5 jarcentojn. La romianoj koloniis la landon, konstruis urbojn kaj bonajn vojojn. Hodiaŭ de tiu periodo estas jam nur ruinoj. Kiam finiĝis la romia imperio, komenciĝis invadoj de britoj. Ili importis siajn lingvon kaj la kristanan religion. Armoriko iĝis Bretonio. Nobeloj kaj episkopoj konstruis kastelojn kaj abatejojn, pligrandigis urbojn kaj protektis ilin per fortikaĵoj. Post multaj bataloj kaj pluraj politikaj edziniĝoj Dukoj de Bretonio unuigis la sendependan landon. La franca reĝo Francisko la unua, kiu edzinigis dukinon Klaŭdo de Bretonio, subskribis en la jaro 1532 edikton, kiu agnoskis aŭtonomecon de Bretonio. La reĝoj, tamen, nomis guberniestrojn por kontroli la provincon. Dum sekvaj jarcentoj la statuso de Bretonio evoluis pli kaj pli al perdo de aŭtonomeco. Nur en 1790



estis kreitaj la novaj administraj teritorioj: 5 departementoj.

Por la franca regno la bretonaj marbordoj iĝis la novaj limoj de la ŝtato kiam samtempe la transoceana trafiko (orienten kaj okcidenten) plikreskis.

La sinsekvaj registaroj modernigis aŭ estigis bonajn havenojn kaj konstruis citadelojn por defendi la teritorion kontraŭ la malamikoj (ĉefe la angloj). Por faciligi la navigadon pli ol 100 lumturoj estis konstruitaj sur ĉiun danĝeran lokon de la marbordo. Multaj bretonoj iĝis maristoj. Dum la 19a kaj 20a jarcentoj la bretona ekonomio evoluis. Kultura movado disvolviĝis; intelektuloj interesiĝis pri la tradicioj kaj historio de Bretonio.

En 1923 estis desegnita la bretona flago (la Gwenn Ha Du = blanka kaj nigra) de la bretona arkitekto kaj naciista batalanto Morvan Marchal. Li eluzis historiajn motivojn de la regiono. La 11 simbolaj ermenoj prezentas la iamajn bretonajn dukojn kaj estas kunligitaj kun la devizo “Prefere morto ol malpurigo”. La 9 horizontalaj strioj aludas al la 9 iamaj episkopejoj.

Ekde la komenco de la 20a jarcento la franca lingvo, jam oficiala en Bretonio, fariĝis pli kaj pli ekskluziva. Oni uzas ankaŭ la bretonan lingvon (Brezhoneg), sed ĝi tamen ne havas oficialan statuton.

La maro preskaŭ ĉirkaŭas Bretonion kaj ĝi ludas gravan rolon en la vivo de ĉiu bretono, ĉar ĉi-loka ekonomio



grave dependas de la maro. De multaj jarcentoj fiŝkaptado kaj mara komerco havigis vivrimedojn al la bretonoj. Tial en granda ŝipkonstruejo oni konstruas la gigantajn pasaĝerŝipojn. Etaj entreprenoj fabrikas kaj riparas ŝipojn, partojn de ŝipoj kaj aŭtomobiloj. Alia ĉefa aktivaĵo en Bretonio estas agrikulturo kaj precipe la bredado de hejmbestoj (bovinoj por lakto kaj viando, porkoj, kortobirdoj). Ĉi tie oni kulturas ankaŭ cerealojn, fruktojn (pomojn ĉefe por fari cidron, fragojn), maraĵojn (algojn, salikokojn, jakobajn pektenojn, ostrojn, mitulojn), legomojn (florbrasikon, artiŝokon). Multaj agronutraĵaj entreprenoj transformas tiujn produktaĵojn.

Bretonio estas la 4a franca regiono pri turismo. Ĝi havigas multegajn vidindaĵojn. Parolante pri Bretonio oni devas nepre menciigi maron. Ĝi estas tre varia kun altaj klifoj, belegaj plaĝoj, rokoj kaj insuletoj. Tamen grandparte la tuta Bretonio konsistas el ŝtono, ĉefe el skisto, granito kaj grejso. Promenante tra Bretonio ni admiros ne nur rokan pejzaĝon kun erikoj kaj ŝtonoj, sed ankaŭ belegajn vilaĝojn el granito, domojn el ŝtono, skulptitajn kalvariojn, ŝtonajn krucojn ĉe la krucvojo, tipajn preĝejojn aŭ kapelojn...

La plej fama manĝaĵo en Bretonio estas krespoj de fagopiro, kiuj estas ankaŭ troveblaj en restoracioj aŭ bazaroj en la tuta Francio. En Francio estas ankaŭ fama bretona butero, kaj tial oni devas ĉi tie provi panon kun butero, kiu bretone nomiĝas *kouign-amann*. Vizitante Bretonion oni devas gustumi ankaŭ *kig-a-farzh*. Tio estas bretona viando kun diversaj legomoj kaj pastaĵo el fagopiro.

Bretonio estas paradizo por velŝipoj sportaj kaj familiaj, ankaŭ por naturkaj -kulturŝatantoj. Nepre vizitu tiun regionon de Francio kaj planu vian viziton aŭguste dum la Internaciaj Renkontiĝoj de Pluezek, kiuj okazadas ĉiun jaron ekde 1997. Pluezek en la bretona *Ploueg-Ar-Mor* signifas “paca popolo ĉe la maro”.



Legendo

Dum la ĉi-jaraj aŭgustaj Internaciaj Pluezekaj Renkontiĝoj Jeanne Pouhaër rakontis la legendon “La feinoj de la strando”, dum la kurso pri fabeloj.

La feinoj de la strando

Laŭ iuj praaĵoj, malnovtempe vivis feinoj en la regiono de Sankta Mikaelo (Saint-Michel-en Grève). Dumtage ili estis nevideblaj, sed nokte oni ofte vidis ilin. Ili estis servemaj, sed ofendiĝemaj, kaj ofte ili venĝis sin, kiam oni insultis ilin. Dum la plenumaj noktoj ili eliris el la grotoj aŭ el la kavaj trunkoj, por rondanci sur la strando, ĉiam kantante: “lundo, mardo, merkredo...lundo, mardo...”

En la vilaĝo kompatinda orfino aŭdis, ke la feinoj estus dancintaj ĝis la mondfino, se ili ne sukcesus trovi la finon de tiu kanto. Iuvespere la povrulino sin kaŝis en bosketon, kaj nokte, kompatema, partoprenis la rondon kantante: “vendredo, sabato, dimanĉo..., vendredo...”.

La feinoj ĝojis kaj ĝuis scii la refrensekvon. Ili tuj sorĉkante transsorĉis la junulinon al bela blonda princino. Lacega, la orfineto ekdormis sur la strando.

Frumatene, kiam la suno aperis, ŝi vekigis en la brakoj de ĉarma princo. El la balo restis nur rondospuroj sur la sablo, kie ili dancis, spuroj baldaŭ forviŝitaj de la alfluo.

Kelkaj olduloj asertis, ke la feinoj malaperis de la mondo. Sed nur unu Mikaelano ekvidis la feinojn.

Jen lia historio

Iam, sub la lunbrilo, tiu viro, kun sia hundo, revenis de iu trinkfesto. Li ekvidis apud la rivereto “le Kerdu” feinaron, kiu sekigis tukojn, broditajn per oro kaj diamantoj. La hundo bojis kaj tuj la plej maljuna feino ekkriis: “Ej, Vi! Povrulo vi estas, povrulo vi restos!” – kaj fulme ili

malaperis fumen... Tamen, plaĉis la junulo al la plej juna feino...

Sekvan matenon junulino, serĉanta laboron, sin prezentis ĉe la farmbieno de la junulo. Oni dungis ŝin kiel servistinon. Frumatene ŝi mastrumis la domon, bruligis lignon en la kameno, zorgis pri la bestoj kaj antaŭ la aŭroro ŝi jam estis tranĉanta plurajn tritikogarbojn, kiam la mastroj nur ellitiĝis. Ĉe la lavejo neniu kapablis blankigi la tukojn kiel ŝi, sed tion ŝi faris nur dumnokte.

La junulo, mirigita de ŝia kuraĝo kaj de ŝia ĉarmo, edziĝ-petis ŝin. Ŝi akceptis, kondiĉe ke ŝia edzo, kio ajn alvenos, neniam insultos ŝin. Ĉiuj partoprenis la geedziĝ-feston, kaj baldaŭ naskiĝis du belaj infanoj. Longtempe ili vivis feliĉaj...

Iumatene, julie, la viro foriris al la foiro, kiu ĉiujare okazis en la vilaĝo, dum la virino rikoltis kaj engarbejigis la tritikon. Vespere, kiam li revenis, la edzo vidis la garbojn. Tuj, li ekkoleris: “Stultulino”, li diris, “ĉu vi ne vidas, ke la spikoj estas nematuraj?! ”Tuj lia edzino vaporiĝis fumen!

Granda diluvo tuj dronigis la regionon. Fulmotondro minacis, la vento blovegis ĝis elradikigi la arbojn kaj hajlo difektis ĉiujn kreskaĵojn.

Kia aflikto en la regiono de Sankta Mikaelo! Ĉiuj rikoltoj estis detruitaj, nur la tritik-rikolto de tiu viro estis ŝirmita, sed, neniam li revidis sian edzinon.

Tamen, ĉiunokte, ne sciate de li, ŝi revenis por kisi siajn infanojn, blankigi la tukojn kaj mastrumi la domon kiel antaŭe.

La konkursa tasko


Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) prezentas la tekston de “Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo”.

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko “Konkurso – legendo” ĝis la 30a de oktobro 2017, al la adreso de la rubrikestrino.

La valorajn premiojn fondis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado.

Pri niaj someraj renkontiĝoj

La rubrikon
prizorgas:
Stefan MacGill



Horizontale →

1. Du pli ol kvar. Krome la siglo (akronimo, mallongigo) de populara renkontiĝo en Slovakio, kiu okazas en la sama jarparto kiel la Universala Kongreso, kies akronimo estas UK. (3)
4. La _____ esperantistoj organizis kaj gastigis la 102an Universalan Kongreson. (6)
7. Internacia Cirko (akronimo, mallongigo 2).
8. La voko de strigo (R 4).
9. Dolĉan substancon ofte orkoloran; ĝin produktas abeloj. (6)
11. La japana nomo por la tradicia ceremonio. (6)
12. Artefaritan substancon, kreitan el oleo. Ofte uzata por fiŝkaptistaj dratoj kaj ŝtrumpoj por virinoj. (7)
13. Organzio de Aziaj Studoj (akronimo, mallongigo 3)
14. La japana tradicia dramo (R 2).

Vertikale ↓

1. Helpservo al personoj rilatas al _____ laboro (7)
2. En UK okazas pli da program____oj ol povas partopreni unu homo; necesas ofte elekti. (2)
3. Por la urbo de la 102a UK, la asocio UEA elektis _____. (6)
4. Manĝaĵo tre amata kaj populara inter koreoj estas _____; kies bazo estas forte spicita brasiko. (6)
5. Per mikso de du metaloj oni kreas _____. (6). Ekzemple, por krei bronzon, oni miksas kupron kun iom da stano kaj eble pliaj metaloj kiel aluminio, magnezio, nikelo aŭ zinko.
6. La multetna provinco en la sudo de Ĉinio, kie okazis la 47a Konferenco de ILEI (la instruistoj) en la urbo Kunmingo. (6)
10. Estos interne. (4)

Solve el la antaŭa numero





Landaj Rerezentantoj – Perantoj de Juna Amiko

Argentino: info@esperantoargentina.org. **Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; info@esperanto.org.au. **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; aon.913548977@aon.at. **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen; financoj@fel.esperanto.be. **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; belabutiko@esperanto.org.br. **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; eab@esperanto.org.uk. **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; mrvp@interpres.org. **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady III.; polnickypavel@seznam.cz. **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico. **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; arke.gong@qq.com. **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 Koebenhavn; arnecasper@dbmail.dk. **Estonio:** Ahto Siimson, Kastani 12-11, Paikuse, EE-86602 Pärnu maakond; ahto.siimson@esperanto.ee. **Finnlando:** Hämäläinen Sylvia, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; sylvia.h@kolumbus.fi. **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Ceresaie, FR-75004 Paris; zav@esperanto-panorama.net. **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; wolfgang.schwanzer@esperanto.de. **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; zsofia.korody@esperanto.de. **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thokoly ut. 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; hungario@gmail.com, www.esperantohea.hu. HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; simio_2004@yahoo.es. **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; esperanto@isl.is. **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-53490 Givatatjim; saviogp@zahav.net.il. **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; silkovojo@aliceposta.it. **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; esperanto@jei.or.jp. **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; marija@hes-keu.hr. **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; irenaa@takas.lt. **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne; akbondhus@jkn.no. **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; gddewar@ihug.co.nz. **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatar, Koźmicie Wielkie 323, PL-32-020 Wieliczka; mtatar@gmail.com. **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; asocio@esperanto.pt. **Rumanio:** Crancau, Ioan, B-dul Bucuresti 5/53, RO-4800 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; sezonoj@mail.ru. **Serbio:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, RS-18000 Niš; zciric2@gmail.com. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; petro@ikso.net. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B lgh 1303, SE-931 38 Skellefteå; leif.holmlund@telia.com. **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; ch_scheidegger@bluewin.ch. **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; rezamenhof@yahoo.com. **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome, Togo; esp.togo@cafe.tg. **Usono:** Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530; usa@esperanto-usa.org. **Venezuelo:** Peter Jaimez, Poŝtkesto 3482, VE-1010 A Caracas. **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; uea@uea.org. **Mendojn eblas sendi ankaŭ al ILEI.oficejo@gmail.com.**



Esperanto en Woodstock

Polaj esperantistoj de Multkultura Edukcentro en Nowy Sącz okazigis de la 3-a ĝis la 5-a de aŭgusto 2017 Multkulturan Vilaĝon Esperanto.

Ĝi okazis, jam la duan fojon, dum la mondfama rokmuzika festivalo *Przystanek Woodstock* – Haltejo Woodstock, en Kostrzyn ĉe Odrow, ĉe la pola/germana landlimo. La festivalon fondis en 1995 la pola ĵurnalisto kaj aktivulo Jerzy Owsiak. Ĝi rilatas al la bonfara organizo WOŚP, Wielka Orkiestra Świątecznej Pomocy (Granda Orkestro de Kristnaska Helpo), kiu helpo de junaj homoj kolektas monon por helpi hospitalojn. Vidu https://pl.wikipedia.org/wiki/Wielka_Orkiestra_%C5%9Awi%C4%85tecznej_Pomocy.

La projekton jam la duan fojon monsubtenis UEA kaj bonkoruloj, kiuj komprenis ĝian unikecon, direktitan al duonmiliono (!!!) da gejunuloj, kiu jam 23-foje ĉeestis la senkoston rokmuzikan festivalon, baptitan de Jurek Owsiak per la vortoj: Amo – Amikeco – Muziko.

Multkultura vilaĝo Esperanto denove situas en la plej prestiĝa zono de la festivala tereno: sur la monteto de Akademio de Belegaj Artoj, ASP, kie estis sesdeko da institucioj/organizoj el la kampo de edukado, kulturo kaj arto. Nia 20-persona teamo de mateno ĝis vespero laboris por informi kaj reklami pri Esperanto. Kursoj de Esperanto, gvidataj de Stano Marček 3-foje tage, allogis grupojn de entuziasmluloj, kiuj dum 2-horaj lecionoj ellernis po 6-7 lecionoj! Alia furoraĵo estis prelegoj de Kamil Dudkowski pri malmultekosta vojaĝado tra la mondo. Kamil, fervora vojaĝanto, kiu malgraŭ juna aĝo jam vizitis pli ol 70 landojn, allogis eĉ dufoje tage

interesigantojn pri veturado “preskaŭ sen mono”. Nia informo agado ĉe la stando estis pliriĝigita per kolektado de subskriboj por Paca Nobelpremio al la organizantoj de la festivalo. La rezulto estis pli ol du mil subskriboj! Gastojn en nian tendon invitis kantante jOmO kaj knabinoj el la grupo Esperanto-Familio. Valoran helpon donis reprezentanto de TEJO Alessandro Bonfanti. Ili ambaŭ kun jOmO montris internaciecon de la lingvo, parolante kun la gastoj, motivante ilin al lernado de Esperanto. Senlace laboris ĉe la stando ankaŭ nia plej maljuna teamano Kazimierz Krzyżak, iniciatinto de la projekto, Andreo Sochacki kaj Michał Sidorowicz. Ne mezurebla estas valoro de la kontribuo de Stano Marček, kiu kunportis imponan informan kaj edukatan materialon kaj instruis po 6 horojn tage!

Tre riĉa estis la informo Esperanto-stando: 10-metrojn longa ŝildo informis pri Multkultura Vilaĝo Esperanto. Antaŭ la tendoj staris rulafiŝoj kun eldonaĵoj de Stano Marček, kun ilia ekspozicio apude sur grandaj tabloj. Tre interesis la publikon la fakto, ke la lernolibroj estis eldonitaj en kvardeko da lingvoj; inter ili tre ekzotaj...

La dua informo rulafiŝo invitis al la kampanjo pri aplikado de Esperanto en telefonoj kaj platkomputiloj Android, kiun preparis Piet Buijnsters, programisto de Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Legu pli ĉe <http://www.iei.nl/ieio77.htm>. La 4-lingva informo aŝiŝo estis la plej ofte fotografata objekto de la preterpasantoj.

Resumante la eventon – ĝi estis eĉ pli efika ol la pasintjara. Vizitis nin pli granda kvanto de gastoj, nekredible efikaj estis la Esperanto-kursoj de Stano. Multaj homoj havis la eblecon informiĝi pri nia movado kaj ekkoni nian lingvon. Tre riĉaj estis la informaj materialoj; inter ili la plej ofte elektata broŝuro “Malkovru Esperanton”.

La ekspozicion pri “Zamenhof kaj lia kreaĵo” ni prezentis sur la vandoj de nia tendumejo.

Halina Komar

Multikultura Vilaço Esperanto en Woodstock 2017

